88/5. * 16,– Ft

HUNGARA VIVO

BVM®

al la estimata legantaro prezentas sin la 25-jara

BVM®

BETON- kaj FERBETON-INDUSTRIA ENTREPRENO B.V.M.

LA AGADO DE LA FABRIKOJ DE BVM:

Tiuj fabrikoj – krom la lasta – produktas fabrikaĵojn kaj strukturojn el betono, ferbetono kaj streĉita betono por la konstruado, trafiko kaj municipaj servoj.

La fabrikoj krom tiuj partoprenas ankaŭ muntadon ĉe konstruado kaj similajn kunlaborojn.

La Fabriko en Kunszentmárton produktas por la Entrepreno la necesajn teknologiajn ekipaĵojn, muntaĵojn kaj ŝablonojn. Ĝi produktas precipe elementojn por ŝtalstrukturoj, krome maŝinojn por la Entrepreno; krom tiuj ĝi laboras ankaŭ por eksteraj mendantoj kaj eksportado.



Fabrikoj kaj uzinoj

BVM BUDAPESTI GYÁRA
H-1117 Budapest XI., Budafoki út 215.
Telefono: 253-840; Telekso: 22-4877

BVM LÁBATLANI GYÁRA
H-2541 Lábatlan, Rákóczi F. u. 1.
Telefono: 6; Telekso: 22-4006

BVM DUNAÚJVÁROSI GYÁRA
H-2400 Dunaújváros, Papírgyári u. 18-20.
Telefono: 18-384; Telekso: 029229

HIRDI TELEPE
Telefono: 13-986

KOMLÓI TELEPE
telefono: 81-123

BVM ALSÓZSOLCAI GYÁRA
H-3571 Alsózsolca
Telefono: 17-811; Telekso: 062268

BVM SZENTENDREI GYÁRA
H-2001 Szentendre, Dózsa gy. u. 34.
Telefono: 10-622; Telekso: 225836

VÁCI TELEPE
Telefono: 12-796

BVM SZOLNOKI GYÁRA
H-5000 Szolnok, Panel u.
Telefono: 17-450; Telekso: 023326

BVM MISKOLCI GYÁRA
H-3501 Miskolc, József A. u. 25-27.
Telefono: 15041; Telekso: 062277

BODROGKERESZTÚRI TELEPE
Telefono: 11-177

KAZINCBARCIKAI TELEPE
Telefono: 11-177

BVM KUNSZENTMÁRTONI GYÁRA
h-5440 Kunszentmárton, Tiszakürti út 6.
Telefono: 62; Telekso: 023366

HUNGARA VIVO

ENHAVO

Szenes, Imre: Skulptisto de la medalo „Esperanto Centjara" (E.F.) 162
Fejes, Márton: Somerfinaj notoj 164
Princz Oszkár: Esperanto en la dua jarcento 166
Tvarozek, Eduard: Kesto da venenaj serpentoj 169
Ertl, István: La deka logo 172
Csiszár, Ada: In memoriam Tibor Sekelj (1912–1988) 174
Esperantaj libroj el Hungario 176
Panoramo 180
Fenyvesi, Ervin: Revuo de revuoj 183
Metiaj kontribuaĵoj al medioprotekto (*E. Fenyvesi*) 184
Hungara kablo-fabrikaro. Kablo-fabriko en Szeged (*E. Fenyvesi*) 188
Recenzoj 190
Fenyvesi, Ervin: Gaja paĝo 198
Krucenigmo 199
Ekzameno sen risko 199
Korespondi deziras 200
Leterkesto 200

Sur la frontpaĝo: hungara popoldanco.

Revuo de
Hungara Esperanto-Asocio
Adreso:
Budapest, I. Szentháromság tér 1-3.
Telefono: 563-659, 564-093
Poŝta adreso:
Pf. 193, H-1368 Budapest
Aperas dumonate
XXVIIIa jaro, 1988 n-ro 5
(141)

Per okuloj de novzelandano...



En ĉi tiu Hungara vivo vi trovos kompletan liston de la nun haveblaj eldonaĵoj de Hungara Esperanto-Asocio: tio estas preskaŭ ĉiuj titoloj el la pasintjare eldonita katalogo, plus seso da novaj titoloj, de i.a. Szathmári kaj Nemere.

HEA troviĝas inter la plej aktivaj movadaj eldonantoj, ĝian renomon ĝi gajnis precipe en la periodo 1980-85, kiam regule aperis deko da titoloj jare: represoj, didaktikaĵoj, popular-beletraĵoj kaj -sciencaĵoj. Tiu ritmo iom flagris lastatempe pro la financa tento koncentriĝi pri hungarlingvaj verkoj – ĉe kiuj eblas ekspluati konatan aŭtoron aŭ nokaŭtan temaron. Sed ne estas dezirinde, ke ekonomia premo superregu la eldonan politikon. Restas ĉe HEA forta morala devo avangardi en la Esperant-lingva eldonado, pro ĝia unika pozicio. Ĝi disponas je pli da movada merkato ol aliaj landoj. Ne nur ĝi havas (almenaŭ principe) la rimedojn krei librojn sufiĉe bonkvalite por la okcidenta merkato, sed ankaŭ la soclanda merkato estas kreskagrade ĉerpebla. Libro, kiun oni eldonus okcidente en mil ekzempleroj povas ĉi tie aperi en kvinmil.

Ni tamen ne sidu kontente en ĉi tiu situacio – ĝi ne estas senfina. Unuflanke, atingas nin spuroj, ke aliaj soclandoj ekakiras la necesajn rimedojn eldoni librojn bonkvalite kaj kun malpli da burokrataj obstakloj kaj limigoj je enhavo. Aliflanke, niaj prezoj tiom abrupte kreskas, ke niaj produkto-kostoj baldaŭ atingos okcidentajn nivelojn; kelk-terene ili jam tion faris. Sidiĝu en bone remburita seĝo antaŭ ol interesiĝi pri la prezoj de la venontaj Esperantaj libroj de HEA. Ni baldaŭ transdonos nian prezavantaĝon al niaj socfratoj. Krome, pli efikaj okcidentaj eldonejoj povos ekvendi siajn librojn rekte en la ĝis nun fermita socmerkato.

Kiujn imperativojn ni en Hungario sekve obeu?

- *gardu kaj bonigu la kvaliton (enhavan kaj teknikan);*
- *gardu la intensecon de eldonado, ĉar la tempopasado ne favoras nin;*
- *limigu la prezaltiĝojn per pli efika administrado kaj pli intensa kaj zorga utiligo de rimedoj (precipe tiuj nevaste akireblaj enlande);*
- *reinvestu kiom eble el la profitoj de eldonado (Esperanta kaj hungara) en la estontan eldonan agadon kaj strategion.*

Kaj fine restas imperativo por la publiko. Tiu profito kaj reinvesteblo naskiĝas nur pro viaj aĉetemo kaj legemo. Eldonadi marĝene profitajn Esperantajn librojn oni povas nur se troviĝas por ili sufiĉa publiko. Pro sia diseco, la esperanta komunumo, pli ol aliaj, dependas de libroj, de siaj literaturo kaj skriba kulturo. Sekve, kiam

mi uzas la vortojn 'profito' kaj 'reinvesto' mi pensas ne nur pri forintoj, guldenoj kaj nepagitaj fakturoj, sed pri la spirita profito de nia komunumo kaj investado en ĝia regenero kaj plufortiĝo.

Novjare rezoluciu aldoni libron aŭ kelkajn al via 'legota' bretaro!

Stefan MacGill

La skulptisto de la medalo „Esperanto Centjara"



Skulptartisto Barna Búza

Bone konata skulptisto-medalisto formis belan medalon por Hungara Esperanto-Asocio, honore – kaj por honorigi per ĝi – al la centjariĝo de niaj lingvo kaj movado. Pri la arto de la 78-jara majstro, Barna Búza la fakuloj kaj kritikistoj parolas per superlativoj: lia nobla klasikismo aperas en modernaj manieroj, kaj malhavas trajtojn de la nur modiĝintaj efemeraj tendencoj. Liaj verkoj dise troviĝas en famaj muzeoj, kolektoj, en publikaj institucioj, lernejoj, preĝejoj, kaj aparte multaj sur placoj. Enlande kaj eksterlande liaj artistaj ideoj videblas en bronza, ŝtona, ligna formoj vere multloke.

Lia nomo markas firman valoron en artismaj rondoj. Ĉar mi bone konastion, min tiklis scivolemo pri lia nuntempe ekuzita materialo, do mi demandis lin:

– Mi aŭdis, ke vi ne trovas ĉiam sufiĉa la naturdonitan gamon de materialoj, kaj pro tio vi kreis novan skulptindan materialon. Kio ĝi estas, kiel tio okazis?

– Tio komenciĝis, kiam mi prilaboris la grandmezuran verkon, monumenton de la hungara-soveta amikeco – sonis la respondo de la artisto. – Ties du figuroj staras nun en la parko Druĵba de Moskvo, kaj ĝia varianto en Budapeŝto; ambaŭloke el tre solida materialo, t.n. pirogranito. Fakte ĝi estas silikat-argilo, bakita je alta temperaturo de 1300 Celsiaj gradoj; temas pri invento de Vilmos Zsolnay, fama iama porcelanfabrikisto en Pécs. El tiu pirogranito mi kreis – per speciala alojado de neferaj metaloj – novan materialon por skulptado, la t.n. pirobronzon. Ĝi montriĝis senlime rezista, kaj tiel dura, ke eĉ vitro estas tranĉebla per ĝi. Mi jam uzis tiun novspecan materialon ĉe kelkaj surplacaj statuoj, el kiuj mi mencias la du bustojn de la fama regnestro Rákóczi – nun en urboj Kisvárda kaj Berettyóújfalu.

Mi bone scias, ke la majstro kreis jam tiom multe da surplacaj statuoj, ke li jam ne registras por si tiujn artaĵojn, kiuj alportis novan, daŭre efikan belecon en ilian ĉirkaŭaĵon. Ĉirkaŭigardante en lia arta metiejo mi rimarkas la saman belecon ĉe la restintaj argilmodeloj, kiuj radias serenan etoson ĉirkaŭ si. Same serene, bonhumore laboras tie la artisto, kies movoj cetere tute ne sentigas la altan aĝon, nek la streĉojn de la verkado.

Liaj verkoj – ankaŭ liaj paroloj – atestas pri la arta kredo je la tradicioj de la grandaj antaŭuloj, kiujn lia originaleco suverene freŝigas por prezenti aktuale gravajn direndojn al la nuntempo. Lia respekto al la historio, al la iamaj bravuloj, kuniĝas kun profunde humana patriotismo.

– Kiuj viaj verkoj estas aparte memorindaj por vi, precipe pro la artaj kaj ideaj direndoj?

– Preskaŭ al ĉiuj ligas min interesaj rememoroj, ankaŭ apartaj pensoj; tamen mi mencias du el ili. Post la liberiĝo mia unua verko rememoris iun virinon, kiu dum la milito strange kaj perpleksite, tute konsterniĝinte reagis ekvidante sian disbombitan domon. Ŝia teruriga hejmo-perdo inspiris min krei la statuon „Tertremo", 75 cm altan el ligno de pirujo. Ĝia efekto estis drameca ĉe ĉiuj, kiuj rigardis ĝin, nun videblan en Muzeo Janus Pannonius de Pécs.

La dua el la memorindaj estas mia plej grandmezura verko, 16 metrojn larĝa kaj 5 metrojn alta, speciale farita subĉiela reliefo, establita en Battonya memore al la 90a jarreveno de granda agrarsocialisma demonstracio, samtempe funebrante la mortpafitajn viktimojn fare de la tiama ĝendarmaro.

Kiam mi ekkonis la artiston. Búza estis ano de la ĉefurba konsilio, samtempe parlamenta deputito, ĉar la lokaj loĝantoj abrupte kandidatigis lin kontraŭ iu alia kandidato. Tiam – antaŭ 15 jaroj – mi interparolis plurfoje kiel ĵurnalisto kun li. Foje. menciante Esperanton, li tuj ekinteresiĝis kiel humanisma artisto pri nia internacia movado. Ricevinte abunde da informoj, baldaŭ li donis eĉ favoran intervjuon al nia hungarlingva E-revuo „Mondo kaj Lingvo", kiun li daŭre sekvis atente kiel abonanto. Li publikigis poste en nia Jarlibro (1981) artikolon, postulante la enkondukon de Eo en la lernejoj cele al la monda kulturiĝo, ankaŭ por interligi la diverslingvajn artistojn.

Barna Búza fariĝis subtenanto de nia E-movado, kaj estis neniel mirinde, kiam sciiĝante pri la proksimiĝanta jubileo de Eo, li entuziasme akceptis la penson krei tiucele memormedalon. „Bonega ideo – li deklaris –, ĝi estu mia propra ofero je honoro de la centenario". Ni kune meditis longe pri ĝia direndo, pri la figurado kaj vortoj, por plej bone esprimi la idean kaj historian gravecon de tiu granda okazo.

Niaj proponoj reciproke stimulis kaj ĉizis sin. Tiel naskiĝis la projekto de la medalo, videbla sur la subaj fotoj. La figura fronto montras simbole la amason de la tutmonda esperantistaro. El ili leviĝas tri manoj; la

D-ro Árpád Máthé kaj Oszkár Princz transprenas la jubilean medalon

Amika babilado kun la majstro kaj kun lia edzino

Barna Búza „ĉiĉeronas" la esperantistajn gastojn en sia artlaborejo
(Fotoj de Zoltán Fejér)

meza mano tenas la torĉon de la ideo, du aliaj manoj levas la flagojn de UN kaj UEA, simbolojn de la homa universaleco kaj konkordo, ankaŭ signante nian esperon rilate la subtenon flanke de UN. Al tio ligiĝas la ĉirkaŭskribo, penso de Zamenhof: „La enkonduko de Esperanto estus la plej bonefika revolucio de la homaro."

Kompreneble reliefiĝas ankaŭ la gravaj datoj: „1887 – 1987".

La dorsflanko de la medalo citas pensojn de internacie konataj personoj koncerne Esperanton. De la franca pensulo kaj politikisto Jean Jaurès: „Esperanto estas la la latino de la demokratiko." De la Usona lingvisto Edward Sapir: „Esperanto estos fortika simbolo de la libereco de la homa spirito."

De la granda rusa verkisto Maksim Gorkij: „Esperanto donus potencan puŝon al la procezo de la kultura disvolviĝo."

Fine la vortoj de la fama hungara verkisto Frigyes Karinthy: „Esperanto estas la unika eblo por solvi la Babelan problemon de la mondo."

La medalo – kun diametro de 11 centimetroj – devis esti preta meze de 1987, sed tion bedaŭrinde malhelpis la longa, suferiga malsano de la majstro. Nur post lia resaniĝo eblis finfari la verkon, kio postulis multe da precizema laboro. Nur printempe de 1988 povis la gvidantoj de HEA transpreni de la artisto en lia laborejo la belan bronzmedalon. Li ricevis aparte belan dankleteron de la estraro de HEA.

La inklino al la artoj daŭras plu en la familio de Barna Búza. Lia filino en la etoso de la patra metiejo maturiĝis artistino, talenta, multe originala ceramikisto. Ŝi daŭre prilaboras siajn verkojn en la komuna hejmo kaj metiejo, kiu troviĝas en „artista loĝareo de Budapeŝto" apud aliaj majstroj de la belartoj. La populara Búza estas ŝatata ankaŭ pro lia saĝa humoro, per kiu li kutimas ebenigi la ĉiam suprenvenantajn problemojn de la vivo, de la artista vivo kaj laboro. Kaj rigardante sian etan nepon, kiu jam knedas ĉarman argilan besteton, videblan ĝermon de la herediĝanta artista talento, Barna Búza petole eldiris opinion:

– Kiu ne subtenas la Esperanto-movadon, tiu kapablas fari ankaŭ alispecajn malindaĵojn...

Imre Szenes
(Tradukis: E. F.)

Somerfinaj Notoj

„Ŝtonoj de Transilvanio" - en renaskiĝinta vilaĝo

Unua tago

Dise en Eŭropo oriente kaj okcidente, same trans Atlantiko daŭras protestaj manifestiĝoj kontraŭ la Rumaniaj vilaĝdetruaj planoj. Krom la juniofina Budapeŝta demonstracio okupiĝis pri la afero senatanoj en Usono, same la deputitoj en Bundestag...

Unu el la Hungariaj protestaj kaj solidarecaj manifestiĝoj estas la grafika ekspozicio „Ŝtonoj de Transilvanio." La titolo estas pruntita de libro de arkitekto, grafikisto kaj verkisto Károly Kós.

„La ŝtonoj scipovas paroli. Kaj tiuj ŝtonoj nur veron diras. Ekde sentempaj tempoj la tero de Transilvanio estas miksa loko de popoloj, religioj, gentoj kaj kulturoj" – skribis la elstara artisto.

La grafikaĵoj ĉiuj koncernas Transilvanion: karakterizaj popolaj konstruaĵoj, preĝejoj, pordoj, lignaj tombmonumentoj. La aranĝanto estas Asocio de Hungaraj Arkitektoj, kaj la kreantoj: arkitektoj Márta Vörös, Tibor Vákár, d-ro József Finta, Péter Reimholz, kaj pentristo Gábor Szinte.

La grafikaĵoj estas aĉeteblaj, la enspezon oni uzos por helpi Rumaniajn rifuĝintojn.

La ekspozicio estis jam en Budapeŝto, en Miskolc kaj en aliaj urboj, kiam fine de aŭgusto atingis min invitilo:

Galerio Püspökszentlászló invitas vin al grafika ekspozicio „Ŝtonoj de Transilvanio" Posedanto: Zsuzsa Deák grafikisto, Hosszúhetény.

Dua tago

Ĉu privata galerio de Zsuzsa Deák? Kiu ŝi estas? Kaj kie situas tiu Püspökszentlászló? – Certe ie en departemento Baranya, ja Hosszúhetény – ŝia loĝloko – estas proksime al



Pécs. La sesvoluma Nova Hungara Enciklopedio ne enhavas ĝin, nek la detala landmapo. Mankas tiu nomo ankaŭ el la esperantlingva, sufiĉe detala turisma eldonaĵo „Baranya, la mistera" de Csaba Székely.

Fine en leksikono eldonita en la tridekaj jaroj mi trovas: Püspökszentlászló: vilaĝo en distrikto de Pécsvárad. 99 loĝantoj. Episkopa kastelo, baroka preĝejo. Stacidomo kaj lasta poŝtoficejo: en Husszúhetény.

Ĉu la milito forvišis la vilaĝon de sur la mapo? Aŭ ĉu ankaŭ ĝin trafis simila sorto kiel vilaĝon Gyürüfű pro senpopoliĝo? – Morgaŭ mi ekscios ĉion. Se privata galerio funkcias en ne ekzistanta vilaĝo – tion mi nepre devas vidi.

Tria tago

En la kafejo Nádor de Pécs, de la lokaj ĵurnalistoj kaj en la urba biblioteko el libroj mi ricevas pliaj informojn.

Laŭ popola legendo hungara reĝo, László la Sankta (1040-1095) ĉi tie trovis azilon kontraŭ tempesto dum ĉasado, kaj post la saviĝo li konstruigis preĝejon. En la jaro 1235 reĝo Endre la II-a donacis la teritorion al episkopo Bertalan, samtempe konstruiĝis episkopa ripozejo. Tempestoj de la historio tiujn neniigis, sed eĉ nun staras la nov-baroka preĝejo kun ligna turo kaj ligna-sindela kupolo (tio estas arkitekta raraĵo) – konstruitaj en la XVIII-a jc.

Fakte la vilaĝon konsistigas 18 domoj, formantaj rektan straton ĝis la sonorilturo. Apud la preĝejo situas Naturprotekta Teritorio.

La iamaj loĝantoj tute forlasis la vilaĝon, parte pro manko de trinkakvo, parte pro manko de laboro. En la montaro mankas kultureblaj areoj, tiel la proksimaj karbminejoj kaj urbaj fabrikoj delogis la vilaĝanojn. Restis nur la eksmonaĥinoj, loĝantaj eĉ nun en la kastelo. Ili flegas la florbedojn, kaj precipe jam unu la alian – pro sia aĝo. En la apudpreĝeja monaĥina tombejo multiĝas la freŝaj krucoj. La vilaĝo tamen vivas!

Kvara tago

De la duone kamparana, duone minista; duone hungara, duone švaba vilaĝo Hosszúhetény post unuhora piediro aŭ dudekminuta veturado per autoĉaro atingeblas Püspökszentlászló.

Nek unusola mankas el la registritaj dek ok domoj, nek unu kadukiĝas, eĉ ĉiuj estas renovigitaj aŭ renovigataj far la novaj posedantoj, kiuj estas ĉiuj urbanoj. Ili aĉetis la domojn por semajnfina ripozejo, sed kelkaj konstante ekloĝis ĉi tie. En vicordo la tria domo havas la numeron 6, kaj la surskribon: Galerio. La posedanto: f-ino Zsuzsa Deák grafikistino jam atendas min. La ekspozicion mi jam vidis en Budapeŝto, tiel restas tempo por ni iom konversacii.

Zsuzsa Deák naskiĝis en 1945, studis en belarta kaj muzika mezlernejo, eklaboris kiel reklamgrafikisto. Ekde la jaro 1974 ŝi estas membro de Belarta Asocio kaj laboras memstare. Krom pri reklamgrafiko ŝi okupiĝas ankaŭ pri pentrado, kaj funkciigas ĉi tiun galerion. Ŝi el propraj kreaĵoj ekspoziciis krom en Budapeŝto en

pluraj enlandaj urboj; eksterlande en Lahti, Osijek kaj Zagrebo.

En la pasinta jaro ŝi inaŭguris la galerion, kie estis jam dek diversaj ekspozicioj, kaj en la pasinta sezono (ekde majo ĝis oktobro) vizitis ĝin 5000 personoj.

Ekspozicion havis ĉi tie: skulptisto Gyula Bocz el Hosszúhetény, glasartisto Georg Michael Gausning el FRG, ceramikisto Sándor Molnár el Pécs, grafikisto György Joszipovics el Budapeŝto, naiva lignoskulptisto Sándor Bodó el Villánykövesdi, baletartisto Imre Eck – kiel grafikisto, kaj aliaj.

Logike sekvas la demando: ĉu via entrepreno funkciigi la galerion estas misio, hobio aŭ negoco?

– Mi ne ŝatas la grandajn vortojn. Simple tio estas mia laboro: duontagon mi okupiĝas pri miaj bildoj, duontagon pri verkoj de aliaj kreantoj. Mi donas eblon al ili por sin prezenti. La enspezoj ne kovras la kostojn de la aranĝaĵoj.

– Viaj pentraĵoj ŝajnas modernaj. Ĉu vi povus vin vicigi al iu stiltendenco? Ĉu vi havas imitindan idealon?

– Mi estas pentristo en la XX-a jarcento kaj tio determinas miajn verkojn. Priartan edukadon mi ricevis en Pécs, kie laboris Ferenc Martyn, Béla Simon kaj Ferenc Lantos (li ankaŭ instruis min), kaj kie estas Muzeoj de Vasarely, Csontvári kaj aliaj.



Tamen, mi ne ŝatas la „enskatoligon," la kategoriojn. Nun mi kreas en tiu ĉi stilo, sed eble morgaŭ mi preferos alian.

Ofte interrompas nian paroladon vizitantoj; aŭtoĉaroj de en- kaj eksterlandaj turistoj haltas antaŭ la domo. Ofte ilia celo estas la preĝejo, sed neniu preteriras la galerion. Enrigardas ankaŭ najbaroj, kaj ekskursantoj el Hosszúhetény, Komló kaj el aliaj urboj, vilaĝoj.

En galerion de senpopoliĝinta vilaĝo venas are homoj por spekti ekspozicion pri l' ankoraŭ vivantaj, sed baldaŭ detruotaj vilaĝoj. Vilaĝon Püspökszentlászló forlasis „indiĝenoj" pro la malfavoraj cirkonstancoj, sed la novaj posedantoj gardis ĉiun ŝtonon, haltigis la pereon.

Püspökszentlászló – vivas.

Sed kio estos pri la Rumaniaj vilaĝoj?

Márton *Fejes*



galéria
PÜSPÖKSZENTLÁSZLÓ

OSZKÁR PRINCZ

Esperanto EN LA DUA JARCENTO

Tio estis la titolo de la konferenco, kiun organizis Hungara Esperanto–Asocio kaj Kooperativo de Literatura Foiro sub la aŭspicio de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) en urbo Szeged (Hungario) inter 13–16 de julio 1988.

La konferencanojn salutis en la nomo de la gastiganta lando Oszkár Princz, sekretario de HEA, en tiu de LFKoop la prezidanto Giorgio Silfer, flanke de TEJO Rezső Baross (estrarano) kaj Roland Levreaud nome de SAT.

La partoprenantoj analizis la atingojn de la unua jarcento, la historion de Esperanto, kaj ili prilaboris erojn de la nova movada strategio. Okupiĝi pri strategiaj demandoj ĉiam estas grava tasko de la movada gvidantaro, sed nun ĉe la komenco de la dua jarcento tio estas precipe aktuala. Videblas, ke dum la unua jarcento la celoj kaj planoj realiĝis nur partete. La mondo, kaj ene de ĝi la komunikado, ŝanĝiĝis, sed dume la celoj kaj strategio de la movado devenas preskaŭ ĉiuj el la periodo de la komenco de la 20a jarcento.

Al la konferenco estis invititaj movadaj gvidantoj kaj teoriuloj, kaj ili estis petataj kontribui al la prilaboro de la nova strategio de la dua jarcento. Sed verŝajne kaj pro la malsufiĉa informado kaj ankaŭ pro malinteresiĝo pluraj kompetentaj esperantistoj malĉeestis. Malgraŭ tio, la konferencon partoprenis 18 esperantistoj el 8 landoj, kaj aldoniĝis al ili preskaŭ duoblo el la partoprenantoj de la samtempe kaj samloke organizita Internacia Junulara Semajno.

Ĉe la komenco estis transdonita la premio **Verko de la jaro** al **István Nemere** pro la romano *La alta akvo.* Ĝin transdonis **Perla Ari Martinelli,** ĉefredaktoro de Literatura Foiro.

Dum la unua konferenca sesio, kiun prezidis P. A. Martinelli, la partoprenantoj povis aŭskulti prelegojn de **Ljubomir Trifonĉovski** pri la *„Problemoj de la Esperanta teatro."* Post li sekvis **Rezső Baross:** *„Ĉu la Esperanto-movado povas ignori naturprotektadon?"* Kaj fine prelegis **Mario Luis Bosso,** kiu prezentis la *Strategion de Bona Volo.*

L. Trifonĉovski analizis la historion de la Esperanto-teatroj, kaj elstarigis tri problemojn ĉi-rilate: lingva nivelo de la aktoroj, literatura bazo; merkato por la teatraj prezentadoj. Li konstatis: - La amatora teatro havas pli altan lingvonivelon kaj malpli altan artnivelon. Tie la partoprenantoj ludas por sia amuzo. En la profesia teatro estas tute inverse - pli alta estas la artnivelo (la kialo estas klara), kaj la lingvoscipovo ofte estas malalta. Iam en la profesia teatro la mono ludas la rolon de stimulilo. - La Esperanto-teatro ankoraŭ atendas kaj atendos originalan dramaturgion en Esperanto kaj perfektajn tradukojn el la originala lingvo (sed ne el pontolingvoj), kies mezuro estu la atingaĵoj de la monda nacilingva literaturo. - Ne estas multenombraj la eblecoj por prezenti sin. La UK, IJK, kelkaj grandaj aranĝoj (kiel ekzemple la Kultura festivalo en Svedio), inter kiuj - la teatraj festivaloj (en Budapeŝto, Parizo, Zagrebo) kaj la deklamkonkursoj (en Vraca kaj Szombathely) preskaŭ estas la nuraj. Tiel oni laboras pri unu spektaklo dum pli ol tri-kvar monatoj por prezenti ĝin unufoje, aŭ du-tri foje.

R. Baross en sia prelego skizis la direktojn de eblaj roloj de esperantistoj en la natur- kaj medioprotektado. Per fortaj argumentoj li klopodis konvinki la aŭskultantataron pri tio, ke ankaŭ la natur- kaj medioprotektado ricevu prioritaton, kaj estu unu inter la plej gravaj taskoj de esperantistaro.

La dua sesio havis la temon: *Esperanto – inter societo(j) kaj komunumo: kia organiza strategio por la dua jarcento?* Enkondukis ĝin **G. Silfer,** prezidis **Rezső Baross.**

La prelegon de G.Silfer sekvis multflanka diskuto en kiu konfrontiĝis akraj opiniodiferencoj inter la adeptoj de komunumo-sistemo - kiun prezentis G.Silfer - kaj tiuj de societo-strukturo. La partoprenantoj tamen konsentis pri tio, ke Esperantio estas duflanka: societa kaj komunuma, kaj ili ne nur parte koincidas sed ankaŭ plektiĝas laŭ cirkvitoj. La prelegon kaj la diskuton resume prezentas ĝia konkluda diskutmaterialo

***

Esperanto – inter societo(j) kaj komunumo:kia organiza strategio por la dua jarcento?

1. Ekde 1888 ni povas paroli pri efektiva esperantistaro. Ĝi prezentas du facetojn, tuj de la komenco: societan kaj komunuman. Ekzemple la Nurenberga Klubo estis societa: la legantaro de La Esperantisto formis ian komunumon. La membrecon en la societo atestas la pago de kotizo: la apartenon al la komunumo legitimas la lingvokono, ne la abonkotizo. La Nurenbergaj klubanoj

havis egalan statuson, ĉu ili scipovis la lingvon, ĉu ili lernis, ĉu ili simpatiis al ĝi; por la legantaro de **„La Esperantisto"** fariĝis evidenta la diferenco inter neesperantistoj, komencantoj kaj lingvanoj; nur la lingvanoj konstituas la komunuman faceton, dum kaj lingvanoj kaj nelingvanoj konstituas la societan.

2.) Inter la societa kaj komunuma facetoj ekzistas, ekde la komenco, nur parta koincido. La distingo fariĝas pli evidenta, kiam oni ekrimarkas, ke la societa faceto produktas precipe propagandan servon, dum el la komununa venas precipe kulturaj valoroj. Sociologie, la societa faceto estas precipe norme orientita movado, dum la komununa faceto estas precipe valore orientita realaĵo.

3.) Se ni akceptas, ke Esperantio estas tiel duflanka (societa/komununa), ni plue rimarkas, ke la societa flanko rigardas la lingvon kiel rimedon je la servo de la makrosocio, dum la komununa sentas kontraston, aŭ almenaŭ konfliktan eblecon inter la mikrosocio kaj la makrosocio.

4.) Konsekvence, ekzemple, unu el la ĉefaj valoroj de Esperantio, la samideana solidareco transnacia, funkcias nur se oni perceptas Esperantion en sia komununa faceto. Ekzemple, la gastigado tra la Pasporta Servo okazas favore al la esperantisto, kiu efektive scipovas la lingvon kaj en sia gastokonduto kapablas mem demonstri agrablan transnaciecon, fakte sendepende de iu membrokarto. La transnacia solidareco, en la societa faceto, perdiĝas tuj kiam la lokaj kondiĉoj malfavoras ĝian manifestiĝon, ĉar la sorto de la societo dependas de ĝiaj funkcikondiĉoj, neniel de la solidareco.

5.) Ju pli la societa faceto evoluis kaj ekspansiis, des pli ĝi bezonis piramidan strukturon: bazo kun lokaj klub(an)oj, provincaj kaj laŭŝtataj or-

ganizoj, internacia aŭ supernacia instanco aŭ estraro. La piramida modelo multobliĝis en la fakaj asocioj. Aliflanke, montriĝas pli kaj pli evidente, ke la komunuma faceto malkonformas al tia piramida modelo.

6. La societa kaj komunuma facetoj ne nur parte koincidas, sed ankaŭ plektiĝas laŭ cirkvitoj. Cirkvito estas aro da homoj uzantaj la lingvon aŭ apogantaj ĝin, kiuj gravitas ĉirkaŭ unu aŭ pluraj polusoj: periodaĵo, opinimovado (el ĝi organizaĵo), kongreso, vojaĝanta instruistaro (precipe en la intermilita periodo), Esperanto–centroj (Greziljono kaj aliaj).

7.) Sesa poluso estas lokalizebla en la Esperantistaj familioj, kie la lingvo estas hereda fenomeno, esenca por la primara ensociigo de la infanoj (denaskismo). La ekesto kaj evoluo de ĉi tiu poluso estas kondiĉita de la matureco de la komunuma faceto.

8.) Ĝis hodiaŭ la preskaŭ ekskluzive aplikata organiza modelo en Esperantio estas la „funkcia organizo" , kiu havas sian akson en la hierarkio. Alternative al la funkcia organizo ekdisvolviĝis la „projekta organizo", kiu havas sian akson en la taskoforto .

Lige kun la temo prelegis **Géza Felső.** La titolo de lia prelego estis: *„La Esperanto–movado kaj la Esperanto–komunumo kaj iliaj misfunkcioj. Eliro el la sakstrato.*

Fare de G.Felső prilaborita strategio por la movado estas resumebla en tri punktoj:

1a. Enirigi Esperanton en la normalajn reproduktoprocezojn de la socio, ekz. instrua sistemo, ŝtata lingvoekzameno-sistemo, lingvistikaj konferencoj organizitaj de neesperantistaj, k.t.p. Tio tre malofte sukcesas, tamen rezigni pri tiu agado ni rajtas nur provizore - por antauprepari ĝin. Movadoj, kiuj ne klopodas eniri en la normalajn reproduktoprocezojn de la socio preskaŭ ĉiam degeneriĝas.

2a. Por antaŭprepari tiun enirigon la movado devas produkti valorojn kaj servojn, akcepteblajn ankaŭ por certa parto de la neesperantistoj.

3a. Por tiuj valoroproduktadoj necesas investoj, precipe se tiuj estas memfortigaj procezo. Ekz, pli da fakliteraturo varbas pli da specialistoj, kiuj pretas fari ion por Esperanto (ofte en siaj fakoj); la ampleksiĝanta faka agado bone impresas la neesperantistajn samfakulojn: denove varbiĝas kelkaj kaj denove komenciĝas la procezo.

La trian sesion prezidis d-ro György Nanovfszky, kaj enkondukis **Marko Picasso** pri *„Esperanto – varo aŭ valoro? Kia surmerkatiga strategio por la dua jarcento?"* Li kiel fakulo de surmerkatigado prezentis tiujn ĝeneralajn principojn kiujn ĉiuj fakuloj utiligas en sia laboro, tiujn adaptante al la specialaj cirkonstancoj de Esperantio, oni povas rezultdone uzi. La demando starigita fare de M.Picasso nome: „Ĉu Esperanto estas varo aŭ valoro?" havis grandan reehon. Iuj plene malkonsentis pri tio, ke Esperanto estas varo, aliaj konvinke atestis la malon: Esperantio havas certan valoron kiun oni intencas vendi. M. Picasso ligis sian prelegon al kvar ĉefaj punktoj de la surmerkatiga taktiko:

1a Produkto de la varo/valoro.

2a Publiko, al kiu ni prezentas nian produkton.

3a Distribuado (agentoj, vendistoj ktp.).

4a Informado (reklamado).

Pro manko de sufiĉa tempo pri ĉi tiu temo la konferencanoj ne povis prilabori diskutmaterialon.

Oszkár Princz prelegis pri la Motivoj de esperantistiĝo". Li konkludis la jenajn tezojn:

1a Esperanto havas pli da altirforto lernigi Esperanton ol anigi la homojn. **2a** Esperanto-movado ne havas forton konservi ĉiujn esperantistojn en la movado. **3a** Parto de la iamaj anoj malesperantistiĝas.

4a La movado kaj la lingvo kontentigas nur ne vivgravajn bezonojn.

Dum la prelego li provis respondi la demandon: Kial ne altiĝas la nombro de la anaro de la landaj Esperanto-Asocioj kaj entute en la mondo?

Por malnovaj eperantistoj estas evidente, ke ĉiujare relative multaj homoj komencas lerni Esperanton, malgraŭ tio la anaro de la asocioj preskaŭ stagnas (eĉ, kompare al la loĝantaro de la mondo malprogresas). Analizante la faktojn estas videble, ke kompare al la anaro de la asocioj ĉiujare cirkaŭ 14-15%-oj da novaj membroj venas, kaj preskaŭ samprocente ili eksiĝas, do la kvanto nur apenaŭ altiĝas. Apogante sin sur diversaj statistikoj kaj deklaroj O.Princz refutis tiun en vastaj rondoj vivantan opinion, ke „kiu infektiĝis pri Esperanto, tiu neniam saniĝas pri tio." Pluraj estas tiuj kiuj enirinte la movadon kaj ne trovante tie la promesitajn servojn, avantaĝon, etoson de la movado kaj facilecon de la lingvo kaj movado, fariĝas foje eĉ aktivaj malamikoj de la movado.

Analizante la kaŭzojn de eksiĝo el la asocioj kaj la antaŭvidatajn servojn oni povos konstati, ke por la plimulto de la eksiĝantoj Esperantio kontentigis nenian intereson, kaj nur la malplimulto eksiĝis pro objektivaj kaŭzoj (malsano, neatingeblo de E-o klubo kaj similaj.)

La fina konkludo de la prelego de O. Princz estis: konservi la aniĝintojn kaj multigi la anaron oni povos nur tiam, se Esperantio pli kaj pli grandprocente kontentigos (viv)gravajn bezonojn.

Dum la kvara sesio prezidis d-ro Árpád Rátkai, enkonduke prelegis **Sándor Révész** pri *„Esperanto kaj la novtipaj sociaj movadoj".*

La enhavon de lia prelego ni prezentas en la formo de diskutmaterialo.

Esperanto fronte al la instituciaj strukturoj de la makrosocio: kia publikrilata strategio por la dua jarcento?

1. Ekde la jaroj 1970aj fortiĝis la kondiĉoj de konstantaj interpersonaj neformalaj kontaktoj. Lige kun tio, la plej forta integra faktoro ene de Esperantio (= la esperantlingva sociosfero) fariĝis la travivaĵo de la internacia hejmeco.

Tiun ŝanĝiĝon favoris la strukturaj trajtoj de Esperantio, kiu aspektas, kompare kun la makrosocio, anticipe alternativa modelo.

2.) La diversaj novtipaj socimovadaj organizaĵoj , bazitaj sur la slogano „pensadi globe, agi loke", akcelas la disvolvon de alternativa modelo publikrilata. Dum la tradiciaj movadoj agas kiel premgrupo por konvinki institucion pri sia modelo, kaj pere de la institucio konvinki la homojn – la novtipaj socimovadaj organizaĵoj funkcias mem kiel modelo por aliaj homoj. La tradiciaj movadoj perceptas la realigon de sia modelo kiel majoritatan kaj prokrastiĝan – la novtipaj socimovadoj perceptas la realigon de sia modelo kiel minoritatan kaj tujan. En la tradicia kazo, la grandigo de la organizaĵo estas pera celo: en la novtipa kazo, la grandigo estas sinplenumo.

Tradicie, ju pli multaj ni estas, des pli forte ni povas premi – novtipe, ju pli multaj ni estas, des pli multaj vivas laŭ niaj principoj.

Tradicie, oni vidas sian rolon en la partopreno en potencbatalo kaj akiro de pozicioj tie – novtipe, oni vidas sinplenumon en la formado de la vivpraktiko.

Eksteren, la tradicia pensmaniero estas kompromisema – la novtipa,

Vegyiek

VENDEJO

Komerca Entrepreno de Kemiindustriaj Produktiloj
Pomalgranda aĉetado en niaj vendejoj
VEGYITÉKA

Nia entrepreno laste malfermis SPECIMEN-VENDEJON

en Budapeŝto V., Kozma Ferenc u. 1. H-1054

Telefono: (36 1) 325-380/101 kaj 113-833

Malfermita: lundo – ĵaŭdo
8–16,30 h
vendredo 8–16 h

La aĉetantoj trovas tie multajn specimenojn de:
– farboj, gluaĵoj, ŝtopaĵoj
– nutraĵindustriaj aldonaĵoj
– aŭto-flegaj artikloj

ne; internen, la tradicia pensmaniero estas disciplina – la novtipa, tolerema.

Tradicie, de iu kerno disbranĉiĝas diversaj strukturoj laŭ piramida modelo – novtipe, ekestas pluraj sendependaj unuoj, diversloke iniciatitaj, disvolviĝantaj laŭ horizontala reta modelo.

3. Esperantio favoras konduton laŭ la novtipa socimovada organizmodelo. Oni konsciiĝu pri tio.

Post la prelegoj, intervenoj, alparoloj, diskutoj la partoprenantoj kompilis konkludan diskutmaterialon. La du **Konkludoj de Segedo** estas kvazaŭ resuma protokolo, akceptita de la partoprenantaj personoj, post la diskuto pri du el la kvar demandoj proponitaj al la konferenco, kaj enkondukitaj respektive de **Sándor Révész** kaj **Giorgio Silfer.** Pri la ceteraj demandoj la malsufiĉa tempo malhelpis kompili analogan dokumenton. Kaj la enkondukoj kaj la intervenoj aperos en volumo kiel aktoj de la konfereco.

La Konkludoj de Szegedo celas esti referenca diskutmaterialo por plua debato sine de Esperantio. Unuan prezenton al la publiko ili spertis en Zagrebo, okaze de IJK, kie ili vekis grandan intereson. Ili disvolvas plian etapon en la esplorado pri la signifo kaj la rolo de nia lingvokomunumo, kaj situas apud la rezultoj de la raŭmisma jardeko, kiun markas dokumentoj kiel la Manifesto (1980) kaj la PSEK–deklaro (1981), kaj studoj kiel tiuj de Leyk (1983) kaj Révész (1987), krom la kontribuoj de la Simpozio apud Varsovio (1984).

* La funkcia organizo precipe aliras la mondon kiel konvinka masmovado aŭ almenau kiel homgrupo.

** Taskoforto: stabo ene de kiu oni ĉerpas homojn el eventuale malsamaj fakoj por formi celgrupon orientitan al la plenumo de difinita projekto.

*** NSO: sociologia difino, kiu koncernas, ekzemple, la ekologiajn movadojn, la novan pacmovadon, diversajn socikulturajn movadojn, por kiuj la ŝtata nivelo estas malpli grava.

Belartaj KONKURSOJ '88

Eduard Tvarožek (Ĉeĥoslovakio)

Teatraĵo, Honora Mencio

KESTO DA VENENAJ SERPENTOJ

(Libere laŭ motivo de la rakontaĵo „La limo sur Rio Grande" de Arthur Gordon.)

Personoj:

John Brown (braŭn), doganejestro, proksimume 50-jara, energia, iom malpaciencema, kolerema kaj kriema

Desmond Geen (grín), doganisto, proksimume 30-jara, mezstatura, trankvilnatura, rezonema

Francisco Gomez, katolika pastro, mezaĝa

Pedro Gonzales, vilaĝano, proksimume 40-jara, kun indianaj trajtoj en la vizaĝo

Scenejo:

Deĵora ejo en malgranda doganejo sur la meksikia-usona limo. Dekstre, maldekstre kaj en la fronta vandoj pordoj, flanke de la fronta pordo fenestro kun tre maldensa kurteno. Apud la dekstra pordo deĵora tablo, sur ĝi paperoj, stampiloj, registra libro (kajero). Sur la fronta vando apud la pordo vesthokaro, sur ĝi pendas du pluvmanteloj kaj du jakoj de uniformo, super ĝi sur breto du doganistaj ĉapoj, sub ĝi sur breto estas du paroj da gumaj ŝirmgantoj.

Kostumoj:

La doganistoj estas en civilaj ŝuoj, surhavas pantalonojn de la uniformo kaj kaki-ĉemizojn. La pastro estas vestita civile, sed tiel, ke tuj videblas, ke li estas pastro (katolika). Pedro estas en vesto de meksikia vilaĝano, sur la kapo li havas grandan sombreron.

(Kiam la kurteno leviĝis, Brown sidas ĉe la tablo kaj trarigardas la alvenintajn poŝtaĵojn. Green staras ĉe la fenestro kaj rigardas eksteren.)

BROWN (*post la tralego de unu el la alvenintaj leteroj subite eksplodas*) La diablo prenu tiun malbenitan Pedron...!

GREEN (*forturnas sin de la fenestro, al Brown*) Ĉu temas pri tiu, pri kiu vi jam rakontis al mi?

BROWN Jes, la sama. Mi prefere konfiskus lian pasporton, por ke li ne plu povu ĝeni nin.

GREEN Bedaŭrinde, por tio ni ne havas leĝan kialon. Kaj dum li havas sian pasporton, li – denove bedaŭrinde! – rajtas pasadi ĉi tie kaj ni! – plej bedaŭrinde! – devas trakti lin.

BROWN (*kun akcento*) Hodiaŭ *vi* traserĉos lin.

GREEN (*sindefende*) Kial mi? Mi estas nova ĉi tie, ankoraŭ ne faris tion kaj havas nenian praktikon pri venenaj serpentoj. Mi certe ne sukcesus trovi tion, kion ni serĉas ĉe li.

BROWN Kaj mi havas malfortan koron kaj ĉiam, kiam tiu malbenita Pedro pasas ĉi tie, minacas al mi infarkto. Mi ĝin ne plu povas fari!

GREEN Kaj mi havas nenian sperton. Se iu el la venenegaj serpentoj mordos min, ĉu vi poste zorgos pri miaj edzino kaj du infanoj?

BROWN (*montras la leteron*) Jen denove avizo, ke Pedro daŭre kontrabandas drogojn. (*Brown parolas ĉiam pli laŭte.*) Vi devas traserĉi lin!

GREEN Mi scias, vi estas la estro ĉi tie kaj rajtas ordoni, sed en la deĵora regularo staras nenio pri tio, ke doganisto devas traserĉi kestojn plenajn de venenaj serpentoj...

BROWN Sed, plej bedaŭrinde, ankaŭ ne staras tie, ke estas malpermesite porti tiajn serpentojn trans la limon. Se estus io tia, la afero ne estus problemo. Sed en la ekzistanta situacio ni devas kontroli la malbenitan Pedron. Cetere, vi mem ĵus diris tion. Do ni devas, tiom pli, ke ni havas ĉi tie la avizon, ke Pedro daŭre kontrabandas narkotikaĵojn. Ni devas, malgraŭ tio, ke ĝi ankaŭ ĉi-foje estos vana laboro.

GREEN Vi diris, ke li pasas ĉi tie ĉiusemajne, ĉu jes?

BROWN Jes, la diablo prenu lin!

GREEN Malbonulon la diablo ne prenas, ĉar tiu mem al li venas.

BROWN (*kolerete*) Ne provu forparoli la aferon per ŝercaj proverboj, Green, ja la afero estas serioza. Tiu ulo promenas ĉi tie, antaŭ niaj okuloj portadas narkotikaĵojn kaj mokridas pri ni, ke ni kapablas trovi ĉe li nenion, la diablo prenu tion!

GREEN Ne timu, iam ni tamen kaptos lin.

BROWN Sed kiel kaj kiam?

GREEN Tiel longe kruĉo iradas preni akvon, ĝis ĝi foje iras preni vinon – kaj mispaŝas, kaj tiam ĝi rompiĝas.

Belartaj KONKURSOJ '88

BROWN Denove viaj proverboj! Ĉesu jam moki min!

GREEN Mi tute ne intencas moki vin, sinjoro kapitano. Mi nur volas diri, ke ĉiu homo, ja tutaj homgrupoj, eĉ tutaj nacioj havas siajn manierojn de vivo, agado kaj konduto, siajn kutimojn, kaj se oni konas ilin bone

BROWN (*„ensaltas" en lian frazon*) Kutimojn, kutimojn...! Mi deĵoras ĉi tie jam la okan jaron kaj konas la kutimojn de la homoj ĉi tie ĝis la lasta detalo. Kaj pasante trans la limon neniu faras al ni folkloran prezentadon pri siaj kutimoj, sed klopodas konduti laŭeble neokulfrape. Kun tia filozofio vi ne kaptos kontrabandiston!

GREEN Nu, ĝuste tiu klopodo konduti neokulfrape iam estas tiel okulfrapa, ke –

BROWN (jam kolere) Babilaĉo! Nuraj frazaĉoj! Se vi estas tiel saĝa, do kontrolu lian keston kaj trovu, kion ni serĉas!

(*Antaŭ la fino de la lasta frazo aŭdiĝas malforta frapado sur la pordon kaj tra la dekstra pordo enpaŝas la PASTRO kaj salutas:*)

PASTRO Bonan tagon, sinjoroj!

BROWN Bonan tagon, pastra moŝto. (*Li ekstaras kaj manpremas kun la pastro. Poste, gestante direkte al Green*:) Permesu afable prezenti al vi mian novan kolegon, leŭtenanton Green. (*Al green*:) Tiu ĉi estas lia pastra moŝto Gomez, paroĥestro en Ordal.

PASTRO (*manpremas kun Green*) Plezuro koni vin. Do ekde nun ankaŭ vi decidados pri miaj iroj kaj revenoj. (*Klarige.*) Nome, mi iamtiam iras viziti mian amikon sur la usona flanko, la dekanon en Belpont... Venante ĉi tien mi jam ekstere aŭdis, ke vi tre vigle diskutas, kaj vi eĉ ne aŭdis, kiam mi frapetis la pordon. Ĉu mi ne interrompis vin en io grava – ?

BROWN Tute ne. Temis nur pri deĵora rutinaĵo... (*Klarige.*) Ekde iu tago ĉiusemajne pasas ĉi tie iu Pedro Gonzales kun kesto da venenaj serpentoj. Li pasos ĉi tie ankaŭ hodiaŭ, kaj temas fakte nur pri tio, kiu traserĉu lian keston kun serpentoj. Ni devas fari tion, ĉar estas serioza suspekto, ke tiu Pedro kontrabandas narkotikaĵojn. Sed neniu el ni emas fari tion, ĉar tio estas danĝera afero. Ĉu vi ne povus helpi al ni trovi iun solvon, pastra moŝto?

PASTRO Se vi ne povas interkonsenti, ni lasu decidi la hazardon. (*Li elprenas el sia poŝo monero, montras ĝin al Brown kaj demandas:*) Ĉu kapo aŭ emblemo?

BROWN Kapo.

PASTRO (*suprenĵetas la moneron en la aeron tiel, ke ĝi turniĝu, rekaptas ĝin kaj montras ĝin sur la manplato al Brown*) Mi bedaŭras – emblemo... Do vi havos la duban plezuron...

BROWN (*mangestas rezigne*).

GREEN (*kiu ekrigardis tra la fenestro*) Sinjoro kapitano, ĉu tiu Pedro veturadas per biciklo?

BROWN Jes.

GREEN Do li jam venas.

BROWN (*iras al la vesthokaro, surprenas unu el la pluvmanteloj kaj paron da longmanikaj ŝirmaj gantoj*).

(*Apenaŭ Brown estas preta, kiam post frapo sur la pordon eniras tra la maldekstra pordo Pedro portanta sufiĉe grandan keston, envolvitan en tuko. Sur la kapo li havas grandan, buntan sombreron.*)

PEDRO Bonan tagon, sinjoroj! (*Tiam li ekrimarkas ankaŭ la pastron kaj salutas lin:*) Laŭdata estu Sinjor' Jesu' Kristo!

PASTRO Poreterne, amen.

BROWN (*al Pedro*) Bonan tagon! Kion vi havas?

PEDRO Kiel kutime.

BROWN (*rezigne*) Nu, donu! (*Li prenas singardeme la keston kaj eniras tra la meza pordo.*)

GREEN (*al Pedro*) Viajn dokumentojn...

PEDRO (*enmanigas al li siajn pasporton kaj 1-2 paperfoliojn*).

GREEN (*prenas la dokumentojn, sidiĝas al la tablo kaj elsktribas el ili ion en sian registrolibron. Poste li metas la dokumentojn sur la tablon kaj sekvas la komenciĝantan interparolon inter la pastro kaj Pedro.*)

PASTRO (*faras paŝon al Pedro kaj alparolas lin*) Ĉu vi estas de tie ĉi, el Ordal?

PEDRO (*turnas sin al la pastro, faras senvole per la maldekstra mano movon kiel por depreni la sombreron, sed haltigas sian brakon duonvoje kaj lasas ĝin fali apud sian flankon*) Jes, estiminda pastro.

PASTRO Ĉu vi do konas min?

PEDRO Jes, estiminda patro.

PASTRO De kie?

PEDRO El la mesoj.

PASTRO Do vi estas mia paroĥano, ĉu ne vere?

PEDRO (*lia brako denove faras negrandan nerveman ekmovon supren, sed tuj refalas*) Jes, estiminda patro.

PASTRO Sed vi ne venadas ofte al la meso...

Belartaj KONKURSOJ '88

PEDRO Ne, bedaŭrinde. Mi vivas izole for en la montaro...

PASTRO Kion vi faras tie?

PEDRO Mi havas du kampetojn inter la montoj. Krom tio mi kaptadas serpentojn.

PESTRO Ĉu tio ne estas tro danĝera?

PEDRO Nu, infana ludo ĝi ne estas, sed la kampetoj ne kapablas vivteni min, do mi devas fari ankaŭ ion alian, por ke mi ne devu iri almozpeti — aŭ ŝteli....

PASTRO Tio estas laŭdinda. Sed diru al mi, por kio estas al iu bezonaj venenaj serpentoj?

PEDRO Mi vendadas ilin al la apotekisto en Belpont kaj li pluvendas ilin al iu sciencesplora instituto, kie oni faras el ili diversajn serojn kaj kuracilojn.

PASTRO (*balancas sian kapon jese*) Ha, jes, mi komprenas...

BROWN (*revenas kun la kesto, metas ĝin sur la plankon antaŭ Pedro, deprenas la gantojn kaj ĵetas ilin kolere sub la vesthokaron. Al Green:*) Nenio, la diablo prenu tion! (*Tuj senkulpiĝe al la pastro:*) Mi petas pri pardono... (*Li deprenas ankaŭ la pluvmantelon, pendigas ĝin sur hokon kaj iras al Pedro, kiu sen ordono disetendas siajn brakojn; Brown palpkontrolas, ĉu Pedro ne havas ion sub la bluzo aŭ ĉemizo — trovas nenion. Al Pedro:*) Prenu vian malbenitan kestaĉon kaj malaperu!

PEDRO (*prenas denove sian keston sub la brakon, prenas ankaŭ siajn dokumentojn desur la tablo kaj iras al la pordo. Tiam*)

GREEN Pardonu, sinjoro Gonzales, mi forgesis doni al vi stampon...

PEDRO (*revenas al la tablo. Tiam*)

GREEN (*ekstaras rapide kaj per subita brakmovo deprenas la sombreron desur la kapo de Pedro. Elsub la sombrero elfalas kelkaj malgrandaj paketoj. Green levas ilin, metas en la sombreron, kiun li montras al Brown dirante*) Ĉu vi eventuale ne serĉas tion ĉi, ĉefo?

BROWN (*rigardas dum momento surprizite la pakaĵetojn kaj Pedron, kiu staras tie kiel fulmotrafita, poste iom mokeme diras al Pedro*) — Nu, sinjoro Gonzales, hodiaŭ vi estas bonŝanca, hodiaŭ vi ne devos en tiu ĉi varmego pene bicikli al Belpont, sed veturos kiel sinjoro — per aŭto, (*kun akcento*) per la polica! Vi komforte ĝisatendos ĝin ĉi tie ĉe ni. Bonvolu! (*li forkondukas Pedron tra la mezan pordon.*)

GREEN (*al la pastro, kiu staras tie surprizegita pro la okazintaĵo*) Mi petas vian pasporton, pastra moŝto. (*Ricevinte la pasporton li enrigardas en ĝin, notas ion en la registrolibron.*) Ĉu vi havas ion por dogantaksi?

PASTRO Nenion.

GREEN (*redonas al li la pasporton*) Dankon! Ĝis revido.

PASTRO (*prenas sian pasporton*) Dankon, ĝis revido! (*Foriras tra la maldekstra pordo...*)

GREEN (*prenas en la manojn unu paketon el la sombrero, poste alian, rigardas, komparas ilin, enpensiĝas.*)

BROWN (*revenas*) Mi gratulas, kolego! Sed diru al mi, kiel vi sciis, kie estas necese serĉi?

GREEN Tiel, ke mi konsideris la aferon el pli vasta rigardo, en pli larĝaj rilatoj.

BROWN Ne parolu kiel universitata profesoro en prelego...

GREEN Do, simple: mi ekde komenco suspektis, ke Pedro uzas la serpentojn nun por forturni nian atenton en falsan direkton. Sur siaj du kampetoj tie supre inter la montoj li povas kreskigi nenion alian ol papavon. El tiu li faras narkotikaĵon, kiun li kontrabandas al Usono. Sed kie serĉi ĝin? Do mi iom ekcerbumis kaj ĉe tiu cerbumado mi praktike profitis mian konon de la meksikiaj kutimoj, kiujn koni, ŝajnas al mi, montriĝis tamen pli utile, ol mi pensis...

BROWN Ne parolu en enigmoj...!

GREEN Ja, en Meksikio estas tia kutimo, ke ĉiu kredanto/katoliko, parolante kun pastro, deprenas sian ĉapelon. Nia Pedro, parolante kun pastro Gomez, ne deprenis la sian — simple, ĉar li ne povis. Kaj el tio mi — (*finas la frazon per gesto*).

BROWN (*dum momento gapas surprizite, poste frapas sian frunton, kvazaŭ por diri: Ke mi ne pensis pri tio...!*)

KURTENO



István Ertl (Hungario)

Belartaj KONKURSOJ '88

Originala Prozo
Honora Mencio

La deka logo

– Ne temas pri tio – diris la instruisto al la knabo, kun nekutima mildo. Alifoje li neniam toleris, ke buboj interrompu liajn klarigojn, ĉefe ne sen deca mansignalo.

– Sed la homon kreis Dio – insistis la knabo. – Tion diris al ni ankaŭ Via instruista moŝto.

– Nu jes, kompreneble, kaj...?

– Pro tio nur Dio rajtas forpreni homan vivon, homo nenial – esprimis sin la infano kun surpriza precizo kaj aplombo.

– Infano mia, pensu pri krimuloj, ŝtatperfidantoj, aliaj fihomoj... sed sufiĉis nun pri tio, mi volas paroli kun vi sola en la paŭzo – finis li, ĉar la klaso, indiferenta pri plenkreskulaj moralaĵoj, ekzumis kun la bremsita elano de tridek adoleskaj gorĝoj.

.....

La mansaketo falis teren. Sufiĉis alpremi la kloroforman vaton al la pudrumita nazo; kapti la inertan inetan korpon kaj porti ĝin kelkdek metrojn ĝis la tieanta ĉaro ne estis granda peno.

Ŝi rekonsciiĝis, firme ligita al brakseĝo, en vasta ĉambro, kiun meblis, krom lito kaj skribotablo, preskaŭ nur bretoj da libroj kaj diskuttabloj. Stereofonie ŝi aŭdis muzikon, kiun ŝi nesciis la Oka simfonio de Beethoven.

– Bonan vekiĝon, Ok – voĉis iu post ŝia dorso, nevidebla.

– Kie mi estas?

– *„Wo bin ich? Ist's Phantasie, dass ich noch lebe?"* Ne citu stulte el tiu infaneca Magia Fluto, dum Vi aŭskultas la majestan Beethoven – mokemis la voĉo.

Silento. Ŝi ne atendis tian voĉon: eĉ sarkasme afablan, de mezaĝa viro.

– Kiu vi...?

– Ne starigu demandojn. Aŭskultu, silentu.

Minuto da senparolo. Poste ŝi reprovis, nekonvinke:

– Lasu min foriri.

– Bonvolu ne forlasi Vian sidlokon antaŭ la fino de la koncerto, Ok.

Kaj la nokto iel pasis. *They rolled over Beethoven.*

.....

La knabo avancis timeme inter la pajloŝtopitaj kaproj kaj reptilioj de la biologia kabineto. La kapon de granda urso, pro ŝerco de lernanto, ornamis fiera bereto. Sparkoj de la instruistaj okulvitroj magnete devigis lin proksimiĝi.

– Sidiĝu, Roĉjo.

Kiel sidilo troviĝis nur skabeno ĉe la piedoj de la instruisto. Roĉjo eksidis kaj kun rigida dorso alvizaĝis la viron.

– Vi estas saĝa knabo, Roĉjo. Mi ĝojas, ke vi memoras tion, kion mi instruis al vi dum la studhoro pri religio.

– Mi ĉiam penas memori, kion mi aŭdas en la lernejo, instruista moŝto.

– Laŭdinde, Roĉjo. Sed hieraŭ ni havis lecionon pri civitanaj konoj, ne pri religio. Ne miksu la aferojn. Vi pravas: Dio donas la vivon kaj Dio ĝin forprenas. Kaj la Dekalogo fakte diras... nu, citu la Dekalogon, Roĉjo.

– „Ne mortigu".

– Prave. Sed kion pri homo, kiu malrespektas la Dekalogon? Se li murdas aŭ faras alian gravan krimon? Ĉu ne estas juste, ke oni ne plu apliku la didonitajn leĝojn al li? Ĉu ne estas saĝe, ke la prudento de la Ŝtato defendu siajn anojn kontraŭ li, se necese, per ekzekuto?

– Ne.

La instruisto levis la brovojn.

– Ne obstinu, infano mia. Tio, kion vi diras, ofendas ne nur min, sed ankaŭ la Amatan Ŝtatestron. Mi ne volonte vin memorigas, Roĉjo, sed ni ja scias, ke via patro grave krimis per konspiro kontraŭ la Amata Ŝtatestro, kaj ke oni decidis ĉesigi lian vivon pro tio. Konsideru, kiel tolerema estas nia Ŝtato: ĝi akceptis vin sen rankoro en elita lernejo.

La knabo depost la neo silentis ruĝvange, lia rigardo laŭglitis beston post besto en tiu instrucela deponejo. Nun li frontis okule la instruiston:

– Mi scias, moŝto, sed...

– Nenia „sed". Iru nun kaj pripensu, Roĉjo.

La knabo ekstaris kaj forkuris sensalute. La instruisto rimarkis nur en la posta tago la poŝtranĉilon pikitan en la felon de la berethava urso.

.....

La ĉi-foja virino ne bone toleris devigan aŭskultadon de la plej rekonebla muziko de la mondo: de la Naŭa de Beethoven.

– Mi bone scias, kiaspeca homo vi estas! Diskojn vi uzas nur por trankviligi viajn viktimojn, kaj poste vi perfortas ilin. Ĉi tiu kaverno fetoras je fraŭla spermo kaj brando!

– Ne kriu, sinjorino Naŭ. Mi volas nenion krom rigardi Vin de ĉi tiel malantaŭ la seĝo, dum Vi aŭskultas muzikon. Ĉu estis viro, kiu amis Vin tiom, ke li ligis Vin al seĝo kaj kontemplis Vin admire dum horoj, kiel mi?

– Aĉa cinikulo! Tuj malligu min, aŭ mi plenkrios la tutan domon! Ĉiel ajn, morgaŭ mi denuncos vin ĉe la polico!

Ĉi tiun inon necesis kloroformi refoje kaj reporti ŝin al la parko. La nokto estis fuŝita.

.....

– Inst... instruista moŝto... en la... en la necesejo Georgo estas pendumita! – balbutis en la klaspordo la minca Arturo, mortpala.

Roberto, la deĵoranto, fakte raportis Georgon antaŭ dek mimutoj foresta pro malsano. La instruisto kuregis al la pisejo, sekvita de la infanaro, kiun li nun ne povis reteni: pendumita je hejta tubo pendolis la korpo de Georgo. La ŝnuro laĉis lin amatore al la tubo, ĝi ne streĉiĝis sur la kolo, kaj Georgo, kvazaŭ kafka blato, tordadis sin inter la planko kaj la hejttubo, baraktante ĉiumembre. La instruisto ekstaris sur la sidilo de la necesejo kaj kviete liberigis lin.

– Kiu faris tion al vi?

La grava ŝoko mutigis la knabon.

– Mi – paŝis antaŭ ilin Roĉjo.

La instruisto ne vangofrapis lin.

– Kial?

– Li ŝtelis de mi globkrajonon. Kaj la Dekalogo diras: ne ŝtelu. Li pekis kontraŭ la Dekalogo, kaj pro tio oni ne plu devas apliki al li la didonitajn leĝojn. Se necese, oni povas lin ekzekuti.

La vangofrapoj, tri, klakis nun.

– Pro tio vi estos forpelita el ĉiuj lernejoj de nia patrujo. Nemirinde ja, kun tia patro... Post la studhoroj venigu vian patrinon al mi.

.....

– Bonan tagon, sinjorino. Vi scias, ke Via filo faris punendan krimon. Tial...

La virino paliĝis kaj falegis tutkorpe tapiŝen. Glaso da akvo verŝita vizaĝen ŝin vekis.

– Ne... helpon!... estas vi! mi rekonas la voĉon! la viro kun la Beethoven-muziko... vi ligis min al seĝo...

– Sinjorino, estas kompreneble, ke la grava krimo de Via filo Vin perturbas. Sed trankviliĝu, mi ne estas kontraŭ Vi, nek kontraŭ Via filo, tamen post *tio* li ne povus eviti elpelon el ĉiuj lern-institutoj de nia lando.

– Hipokritulo! Parolu pri vi mem! Konfesu, kiom da virinoj vi kaptis kaj perfortis mense, orele! Diru, vi... vi... fi!

– Pardonu, sinjorino, se mi tute ne komprenas Vin.

– Ĉu ne? Mi tuj komprenigus al Vi! Vi atakis kaj svenigis min en la parko, trenis en Vian loĝejon, ligis al seĝo, kaj...

– Nu, nu, ĉesigu tion. Per tiaj akuzoj Vi ne povos flankenigi la atenton disde Via filo. Krome, neniu kredus absurdajn kulpigojn de virino, kies edzon oni juste mortpunis pro ŝtatperfido, kontraŭ instruisto dufoje distingita per la medalo „Preferata Ŝtatano"...

Ŝi sciis, ke post la perdo de la edzo nun perdiĝis ankaŭ la futuro de la filo, ŝia unika espero, kies inteligento ĝis nun ĉiam kontraŭpezis la malfavoran devenon.

Senespere, ŝi ĵetis sian larman poŝtukon en lian vizaĝon kaj brufermis post si la pordon.

.....

La instruisto sentis malvarmon en la parko. Li paŝis dekstren, li paŝis liven. Dek – li pensis. Escepta fojo, hodiaŭ ĉio finiĝos alie, *alle Menschen werden Brüder* en la morto; kiu ajn vi estos, vi aŭskultos la lastan simfonion de Beethoven *lastfoje*...

Du figuroj rande de la parko. Alta: virino; eta: certe infano, ambaŭ kun valizoj en la manoj. Kial ne...? La deka kapto estu duobla! Necesos nur bone plani la movojn, ĝustatempe malkaŝiĝi de post bosketo, prepari du pecojn da kloroforma vato.

Unue la korpon de la virino li eklevis. Ho, lia palpsento konas tiujn formojn! Denove... sinjorino Naŭ. Tiukaze la infano devas esti Roĉjo. Triumfo! Ilin neniu serĉos, ja estas tute klare, ke ili, samkiel po dekmiloj da ŝtatanoj jare, decidis fuĝi trans murojn kaj limbarilojn el la lando de la Amata Ŝtatestro. Facila predo por la deka, por la vera fojo!

Ĉi-foje li povis stari fronte al la du viktimseĝoj, li riskis nenion. Post la aŭskultado ili ja ne plu eliros. SEd kion li aŭdigu? Naŭ simfonioj de Beethoven elĉerpiĝis. Ĝisatendinte ilian rekonsciiĝon, li fine reŝaltis la lastfojan Naŭan, kaj restaris antaŭ ilin. Patrino kaj filo gapis lin kun hororo, mutaj pro la enbuŝa stangeto. Li prenis dikan, verdan libron de la skribotablo kaj, okulfiksante la knabon, komencis laŭtlegi la Dekalogon.

...ne ekzistu ĉe vi aliaj dioj antaŭ Mi

Kaj dum li sidiĝis fronte, fotele, krucante neglekte la gambojn,

... ne faru al vi idolon, nek bildon de io, kio estas en la ĉielo...

dum li rigidiĝis, ĉiam legante, en tiu komforta pozo,

... ne malbonuzu la nomon de la Eternulo...

dum ili elsputis la zorge enmetitajn stangetojn,

... observu la tagon sabatan, ke vi tenu ĝin sankta...

dum la ŝnuroj disŝiriĝis sur iliaj brakoj, per kiuj ili maligis ĉiujn siajn membrojn,

... respektu vian patron kaj vian patrinon...

dum ili certiĝis pri tio, ke la instruisto fakte paraliziĝis en sia seĝo, kaj ne plu povas halti en la legado,

... ne mortigu...

dum ili malŝlosis la loĝejan pordon kaj foriris,

... kaj ne adultu...

dum ili retrovis en la parko la valizojn,

... kaj ne ŝelu...

dum ili forveturis el la morna ĉefurbo,

... kaj ne parolu kontraŭ via proksimulo malveran ateston...

dum ili – per helpo de amika konspiro – rampe-rompe trairis la limon, kaj

... kaj ne deziru la edzinon de via proksimulo...

dum ili definitive lasis post si la landon de la Amata Ŝtatestro,

en la loĝejo de Deck Alough, instruisto dufoje honorigita per la medalo „Preferata Ŝtatano", enŝaltite kaj nehaltinte sonis – krom virvoĉa gurdado de dek alineoj el la Libro de Readmono – la neniam ekzistinta, neniam aŭdota Deka Simfonio de Beethoven, *opus innumerabile, opus resurrectum, opus nigrum.*

IN MEMORIAM

Tibor Sekelj

(1912-1988)

Post tritaga lukto kontraŭ la morto, la 20an de Septembro forpasis Tibor Sekelj licenciato, mondfama esplorvojaĝanto, preleganto, publicisto, redaktoro, verkisto, prezidanto de Internacia Geografia Asocio, membro de Akademio de Esperanto, komitatano kaj honora membro de UEA, prezidanto de la Esperantlingva Verkista Asocio.

Tibor Sekelj naskiĝis la 14an de Februaro 1912 en Spišská Sobota (iam Szepesszombat apud Poprad nun en Ĉeĥoslovakio). Li estis 10-jara, kiam la familio translokiĝis al Kikinda (Jugoslavio).

Laŭ la deziro de la patro, li vizitis universitaton en Zagrebo kaj akiris diplomon pri juro. Sed Tibor volis esti nek advokato nek juĝisto. Lin altiris la lingvoj, kulturoj kaj artoj. Li laboris kiel filmdramaturgo kaj ĵurnalisto. En 1939 li translokiĝis en Sud-Amerikon. En tiu jaro en Eŭropo eksplodis la 2a mondmilito. Lia patro kaj la du fratinoj kune kun la tuta familio fariĝis viktimoj de la kontraŭjuda holokaŭsto.

Certe ne havos facilan taskon la biografo, kiu entreprenos registri la bio-bibliografion de Tibor Sekelj, ĉar tiom riĉa estis lia vivo kaj grandskala lia agado.

Laŭ lia rakonto li estis 4-jara, kiam la patro aĉetis la ENCIKLOPEDION PALLAS. La knabeto foliumis la unuan volumon, sed li restis ĉe la litero „A", ĉar tie troviĝas buntaj bildoj kaj mapoj de Afriko, Ameriko, Aŭstralio kaj Azio.

La infana interesiĝo pri la mondo, kune kun la jaroj fortiĝis kaj fine maturiĝis la decido: ekkoni forajn eĉ ekzotikajn mondopartojn, homojn kaj kulturojn.

Tibor Sekelj sukcese realigis sian planon kaj fariĝis – kiel li volonte nomis sin – „mondvagulo". Li estis vera poligloto, li parolis perfekt naŭ



Unu el la lastaj fotoj pri li: la 31an de julio, en la Roterdama urbodomo, dum la kongresa akcepto (Foto de Maria Benczik)

lingvojn – inter ili ankaŭ Esperanton alproprigitan dum la studentaj jaroj – konis plurajn dialektojn kaj tribajn lingvojn, komprenis ankaŭ la mesaĝojn de tamburoj. Li studis pentro- kaj skulptoartojn en Zagrebo. En la universitato de Buenos Aires li studis etnologion, antropologion kaj arkeologion. Li estis 64-jara, kiam li akiris diplomon pri magistreco en la Zagreba Universitato.

La mondvagulo „vagadis" en 80 landoj, faris esplorvojaĝojn en kvin kontinentoj. Li aliĝis al ekspedicio, kiu esploris la regionon de Amazonas, eniĝis en praarbarojn de Brazilo, esploris la vivon de antrofaga tribo „tupari", en Gvatemalo kaj Honduraso studis la maja-kulturon kaj dume en la ĝangalo de Mosquitis malkovris praurbon en Honduraso. En Meksikio li trovis subterajn grotojn kaj akvofalon ĝis tiam neesploritajn. En la montgrimpado lia plej fama ekspedicio estis la atingo (du fojojn) de la 6960 metrojn alta pinto de Akonkagvo en Argentino, kie en 1944 li lokigis triangulan Esperanto-flageton. En 1962 Tibor Sekelj organizis ekspedicion – nomitan Karavano de Amikeco – en Afrikon. Do li estis jam pli ol 50-jara, kiam li montgrimpis al Kilimanĝaro.

La vojaĝoj de Tibor Sekelj en la landoj de Azio – Ĉinio, Hindujo, Japanujo, Nepalo ktp – faris grandan servon ankaŭ al Espranto. „En 1957-58 Esperanto iom ekdisvastiĝadis en la vasta hinda subkontinento – oni legas en ESPERANTO EN PERSPEKTIVO – i.a. dank' al la helpo de senditoj de UEA, Tibor Sekelj kaj..." En Nepalo, sekve de la instruado de Tibor Sekelj, fondiĝis Esperanto-societo en 1957. El liaj multaj iniciatoj kaj atingoj koncerne la Esperantomovadon, elstaras lia ĉefa rolo en akceptigo de Unesko-rezolucio pri Esperanto en 1985.

Kiel verkisto Tibor Sekelj estis talenta, diligenta kaj tre sukcesa. En diversaj revuoj oni legas de li liberajn versojn, geografiajn artikolojn. Li redaktis Geografian Revuon (1956-1964), MONDMAPON en 1968 kaj ekde 1983 la gazeton Velo. Li estis unu el la iniciatintoj de la refondiĝo de la Internacia Verkista Asocio. Tibor Sekelj organizis ĝin, prilaboris ĝian Statuton kaj ekde la fondiĝo (1983) – sub la nomo Esperantlingva Verkista Asocio – li estis prezidanto, vera motoro de tiu ĉi socieo.

En literaturo li akiris grandan popularecon per vojaĝpriskriboj: TEMPESTO SUPER AKONKAGVO (1959), NEPALO MALFERMAS LA

PORDON (1960), GYAMBO, RAFIKI ('Bonan tagon, amiko') (1965), TRA LA BRAZILA PRAARBARO, TRA LA LANDO DE INDIANOJ (1970), KUMEŬAŬA, LA FILO DE ĜANGALO (1979), MONDO DE TRAVIVAĴOJ (1981), NA TRAGU DO\IVLJAJA ('Sur la sojlo de okazaĵoj') (1976) – hungare: ÉJFÉLKOR DŐLNEK A PÁLMÁK ('Noktomeze falas la palmoj'), ELPAFU LA SAGON (1983) – estas interesvekaj rakontoj pri aventuroj de la verkinto en ekzotikaj landoj. Tiuj libroj de Tibor Sekelj – kaj ankaŭ aliaj, ĉi tie ne menciitaj – atingis plurajn eldonojn. Li apartenis al la plej tradukitaj verkistoj, kies libroj aperis angle, hispane, serbokroate, slovene, pole, turke, ĉine, portugale, en ses hindaj lingvoj, germane, france, hungare, japane, hebree, albane kaj kompreneble ankaŭ en Esperanto.

Tibor Sekelj estis elstara kultivanto de la homara kulturo, purkora apostolo de la paco kaj Esperanto, kiu kun arda pasio kaj ĝis la lasta spiro laboris por noblaj celoj de la homaro.

Ada CSISZÁR

Frontpaĝo de la ĵus aperinta hungara eldono de „Kumeaŭa, la filo de la ĝangalo"

Venu al GDR !

La Distrikta Estraro Leipzig de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR vin invitas partopreni en nova internacia esperantista aranĝo, kiu nomiĝas „JARMEZA ESPERANTISTA SEMAJNFINO" (mallonge: JES) kaj okazos de la 23-a ĝis la 25-a de junio 1989 en la urbeto Markkleeberg, kiu estas kvazaŭ urboparto de Leipzig. Ĉiujn preparojn de tiu ĉi aranĝo faras la sama teamo, kiu de multaj jaroj sukcese okazigas la famkonatan aranĝon „IFER" (Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo).

LA „JES" – ORGANIZA KOMITATO invitas ĉiujn esperantistojn de la mondo al partopreno en tiu aranĝo, kiun ni unuafoje okazigos en kunlaboro kun la Agrikultura Ekspozicio de GDR (cetere la plej granda tiaspeca!): oni elektis kiel ĉefan temon

PANON POR ĈIUJ HAVAS LA TERO;

gastigos ĉirkaŭ 250 esperantistojn el multaj landoj de la mondo; ekpetas jam nun proponojn de fakuloj pri prelegoj ktp. kiuj rilatu al la menciita ĉeftemo.

JEN PLIAJ INFORMOJ:

* La „JES"-aranĝo ne nur turniĝas al ekspertoj pri agrikulturo, sed al ĉiuj esperantistoj, kiuj intencas uzi la Internacian Lingvon kiel interkomprenilon. Tamen: interesiĝantoj pri naturprotektado, forstado, naturo en tre vasta senco, bestobredado, etĝardenado kaj similaj temoj havos la okazon pliprofundigi tiurilatajn konojn.
* La arangóo ankaŭ taŭgos por komencantoj de la lingvo Esperanto.
* „JES" okazos sur la areo de la Agrikultura Ekspozicio de GDR en Leipzig-Markkleeberg, do meze de verda naturo! La programaro de tiu Ekspozicio estas ege abunda kaj alloga – vere por ĉies gusto!
* En aŭtuno de la jaro 1988 ni aperigis senkostan ampleksan bultenon, kiu enhavas ĉiujn detalojn de la „JES"-aranĝo. Jam nun oni povas mendi ĝin ĉe:

KULTURBUND DER DDR, Esperanto-Asocio, Käthe-Kollwitz-Strasse 115, Leipzig, DDR-7010.

JAM NUN NOTU:

* La Distrikta Estraro Leipzig de GDREA okazigos, de la 9-a ĝis la 11-a de marto 1990 denove la allogan aranĝon „Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo (IFER). Verŝajne la ĉeftemo pritraktos la fakton, ke Leipzig en 1990 fariĝos 825-jara!

Esperantaj libroj el Hungario

A) LERNOLIBROJ, VORTAROJ, BILDRAKONTOJ



Baghy, J.: LA VERDA KORO. 21 cm, 100 p. Prezo:: 12,- ned gld.
Tiu ĉi romaneto per komencantoj, verkita kun admirinda didka disciplino, povas servi ankaŭ kiel lernolibro, ĉar ĉiun ĉapitron sekvas listo de la uzitaj vortoj, kaj gramatikaj klarigoj.

Benczik, V. (red.): BAZA LEGOLIBRO POR KOMENCANTOJ. 21 cm, 117 p. Prezo: 13,80 gld.
Tridek sep historietoj verkitaj per la vortoj de la unuaj tri (ĉ. 400 vortoj), respektive de la unuaj kvin (ĉ. 700 vortoj) oftecgrupoj de la Baza Radikaro Oficiala, kompilita de la Akademio de Esperanto. La libron kompletigas vortareto de ĉiuj uzitaj vortoj, kun tradukoj en la angla, germana, hungara, rusa kaj pola.

ESPERANTA-KAMBOĜA VORTARO. 21 cm, 148 p. Prezo: 18,- gld.
La unua lernilo de Esperanto en tiu Azia idiomo.

Golden, B.: MARĜENE DE LA LERNOLIBRO. 21 cm, 70 p. Prezo: 6,60 gld.
Prilingvaj artikoloj por kursfinintoj, kun speciala atento al la plej oftaj eraroj.

Lienhard, A.: AMUZAJ DIALOGOJ EN ESPERANTO. 21 cm, 144 p. Ilustrita. Prezo.: 13,80 gld.
Dudek spritaj dialogoj por progresigaj kursoj, kun entute 850 didaktikaj demandoj kaj respondoj.

Lienhardt, A: AMUZA LEGOLIBRO EN ESPERANTO. 21 cm. 226 p. Ilustrita. Prezo: 16,50 gld.
Cent amuzaj historioj diverslongaj; ĉiun historion sekvas po dek didaktikaj demandoj kaj respondoj.

Mészáros, B.: OKLINGVA NOMARO DE EŬROPAJ BIRDOJ. 28 cm, 138 p. Prezo: 12,90 gld.
La nomoj de 579 Eŭropaj birdoj en la lingvoj angla, germana, rusa, pola, ĉeĥa, latina, Esperanta kaj hungara, kun taŭgaj indeksoj ebligantaj facilan uzadon kun ajna elira kaj cel-lingvo.

Prus, B.: LA FARAONO. (Bildrakonto) 24 cm, 44 p. Prezo: 4,80 gld.
Bildrakonta adaptaĵo de la fama pola romantika romano pri la antikva Egiptio.

Seppik, H.: LA TUTA ESPERANTO. 21 cm, 184 p. Prezo: 15,- gld.
Kurslibro por progresantoj, kun multaj gramatikaj kaj stilaj ekzercoj. Detala gramatika indekso helpas uzi ĝin ankaŭ kiel gramatikan manlibron praktikan.

Szerdahelyi, I. ESPERANTO 2. 24 cm, 227 p. Riĉe ilustrita: Bindita. Prezo: 9,- gld.
Rektametoda lernolibro por progresantoj, kun vasta movadhistoria kaj literatura legmaterialo.

TASKFOLIOJ POR KOMENCANTOJ. 28 cm, 32 p. Prezo: 6,- gld.
32 taskfolioj bone uzeblaj en elementaj kursoj.

Twain, M.: LA AVENTUROJ DE TOM SAWYER, (Bildrakonto) 24 cm, 32 p. Prezo: 4,80 gld.
Bildrakonta adaptaĵo de la konata Usona junulara romano.

B) BELETRO

Originalaj beletro:

Adrianova, N.: VAGANTE TRA LA MONDO MALTRANKVILA (Poemaro) 21 cm, 106 p. Prezo: 13,80 gld.
La poemaro de la ukraina esperantistino prikantas la internacian amikecon kaj la pacsopiron de la homoj.



Baghy, J.: HURA! (Romano) 21 cm, 426 p. Bindita. Prezo: 36,- gld.
Strangulo testamentas 230 milionojn da dolaroj al la ĉefurbo de la imagita lando Bagonio, sed la testamento preskribas kondiĉojn tre malhonorigajn por la urbaj gvidantoj. El

la spritega baza ideo disvolviĝas la varia agado de eble la plej interesa romano de la klasika prozisto, en modele esprimriĉa, tamen esence facila lingvaĵo.

Gorov, H.: RIBELA KORDO. (Poemaro) 21 cm, 71 p. Prezo: 8,10 gld.
Poemaro unuavice pri sociaj temoj. Granda parto de la poemoj aperis ankaŭ surdiske.

Grigorov, A.: GARDU LA PACON! (Poemaro) 18 cm, 120 p. Prezo: 10,80 gld
La centra temo de la poemaro estas la pacbatalo. Poemoj verkitaj kun alta formokulturo.
Hules, A: KATOJ KAJ ĈEVALOJ. (Poemaro) 21 cm, 80 p. Prezo: 12,- gld.
Moderntona poemaro, ricevinta tre favoran akcepton ĉe la poeziamantoj.

Kníchal, O.: ADIAŬ, KUZKO! 21 cm, 90 p. Prezo: 12,- gld.
La originala romaneto kondukas la legantoj en la ardan socian atmosferon de la eble plej „sensacia" kontinento, Latina Ameriko.

Lorjak.: EŬLALIA. (Romano) 21 cm, 188 p. Prezo: 21,- gld.
Virtuoze verkita humura-detektiva romano, kun ironia amasigo de hazardoj kaj nekredeblaj okazaĵoj. Krimo, ĉantaĝo, familiaj sekretoj — kaj rido, neelĉerpeble...

Lorjak: ILUZIOJ. (Novelaro) 21 cm, 184 p. Prezo: 18,- gld.
Dek noveloj de la populara franca esperantista aŭtoro, en kiuj sub la ironia stila ŝelo kaŝas sin profunda homamo.

Lorjak: MARIAGNES (Romano) 21 cm, 220 p. Prezo: 21,- gld.
Emerita Pariza bankoficisto enamiĝas al matura sinjorino nomata „Maria", pri kiu baldaŭ evidentiĝas, ke ŝi estas fakte la iam mondkonata filmstelulino Agnes de Vitry. Sed la amrilato disvolviĝas ne senprobleme, la kompatinda bankoficisto miksiĝas en nekredeblajn kaj ridigajn aventurojn... la verko promesas bonan amuzon, kiel ĉiu Lorjak-romano.

Modest, J.: NI VIVOS! 21 cm, 53 p. Prezo: 8,10 gl.d
Dokumenta dramo pri la vivo de Lidia Zamenhof, plurfoje sukcese surscenigita.

Modest, J.: MISTERA LUMO. 21 cm, 82 p. Prezo: 12,- gld.
La milde lirikaj noveloj de la populara aŭtoro estas verkitaj en nuancoriĉa, tamen facila lingvaĵo, tial ili elstare taŭgas ankaŭ kiel postkursaj legaĵoj.

Modest, J.: D-RO BRAUN VIVAS EN NI — KRIPTO. 21 cm, 80 p. Prezo: 12,- gld.
La volumento enhavas du teatraĵojn, el kiuj la unua pensigas, la dua ridigas la legantojn.



Modest, J.: LA ORA POZIDONO. (Romaneto) 21 cm, 68 p. Prezo: 8,10 gld.
Tiu ĉi romaneto prezentas per la rakonto de enamiĝinta junulo, kiel la apero de junulino perturbas la harmonion de mezaĝa geedza paro kun tragika sekvo.

Nedelĉeva. N.: DUM NOKTA DEĴORO. (Novelaro) 21 cm, 80 p. Prezo: 12,- gld.
La noveloj kaj unuaktaĵoj de la bulgara esperantista aŭtorino priskribas pere de emociaj historioj la plej pozitivajn trajtojn de la homa naturo — sindonemon, fidelecon — kaj la kapablon pardoni.



Nemere: I.: LA ALTA AKVO. (Romano) 21 cm, 128 p. Prezo: 15,- gld.
La konstruado de granda hidrocentralo necesigas la evakuon de tuta vilaĝo. Tamen, troviĝas unu homo, kiu ne volas forlasi la domon, al kiuj lin ligas fortaj emociaj fadenoj... „La Verko de la Jaro" 1986.

Nemere, I.: LA BLINDA BIRDO. (Romano) 21 cm, 118 p. Prezo: 15,- gld.
En tiu ĉi sia verko la populara aŭtoro ekzamenas tion, kiagrade ŝtata maljusteco povas mizerigi la individuon. „La Verko de la Jaro" 1983.

Nemere, I.: DUM VI ESTIS KUN NI. (Romano) Eldonita kunlabore kun Oy Mendoservo Ak. 21 cm, 165 p. Prezo: 24,- ned. gld..
La temo de la romano estas la „bona morto": eŭtanazio, la aŭtoro lanĉas la demandon, ĉu oni rajtas helpi al sia nesaveble malsana homfrato trapasi la sojlon inter vivo kaj morto — se tiu mem petas tion?

Nemere. I.: FEBRO. (Romano) 21 cm, 131 p. Prezo: 15,- gld.
En tiu ĉi verko de Nemere sinteziĝas la elementoj de ama, psikologia kaj detektiva romano. Ĝis nun la plej multe vendita romano de la populara aŭtoro.



Nemere, I.: LA MONTO (Romano) 21 cm, 166 p. Prezo: 16,50 gld.
Sur la pinto de alta monto vivas eta komunumo de pacaj homoj, kiuj izolis sin disde la moderna mondo. Tamen, dum la ĵus finiĝinta milito rifuĝis tien kvar soldatoj, kaj ili neniam revenis. Majoro Reman, kiu ricevas la taskon esplori la aferon, spertas sur la montopinto tre strangajn aferojn... „La Verko de la Jaro" 1985.



Nemere, I.: SERĈU MIAN SONĜON. (Romano) 21 cm, 165 p. Prezo: 18,- gld.
Hungaraj geedzoj pasigan sian mielmonaton en Venecio. La edzo renkontiĝas tie hazarde kun sia armena amiko, kaj post kelkaj tagoj iu faras atencon kontraŭ la turka prezidento, vizitanta la belan italan urbon... Ĉu li helpu sian amikon, kiu estas teroristo?

Nemere, I.: SUR KAMPO GRANITA. (Romano) 21 cm, 124 p. Prezo: 15,- gld.
Ĉu dudek jaroj da sinofera, modela vivo povas pardonigi krimon faritan sub la premo de la cirkonstancoj – tio estas la kerna demando en tiu ĉi – laŭ multaj homoj la plej bona – romano de la hungara esperantista aŭtoro. (Inkluzivita en „Baza Legolisto de la Originala Esperanta Literaturo".)

Nemere, I.: TERRA. 21 cm, 165 p. Prezo: 18,- gld.
La nova sciencfikcia romano de la populara aŭtoro, disvolvigŏanta en la kadroj de grandioza kosma televida programo, enhavas aktualegan mesaĝon: ni protektu la sanan vivmedion sur nia globo! Aperos septembre de 1987.

Nemere, I.: VIVI ESTAS DANĜERE. (Romano) 21 cm, 159 p. Prezo: 21,- ned. gld.
La streĉe verkita aventura romano rakontas tion, kiel grupo de dubindaj solduloj forrabas el Kariba insulo iaman militkrimulon, ĉifoje komisiite de la franca registaro.

Szathmári, S.: PERFEKTA CIVITANO. 21 cm, 440 p. Bindita. Prezo: 39,- gld.
Tiu ĉi libro estas la plena novelaro de la klasika esperantista aŭtoro: ĝi enhavas ĉiujn liajn originalajn beletrajn verkojn krom „Vojaĝo al Kazohinio". Kun postparolo de V. Benczik kaj bibliografio de Karl Pov..

Vaha, B.: ADOLESKO. 21 cm, 240 p. Prezo: 18,- gld. (Eldonita kunlabore kun Oy Mendoservo Ak.)
Aŭtobiografia romano de hungara katolika intelektulo-esperantisto. Atuta verko de la moderna Esperanta prozo.

Tradukita beletro:

Aszlányi, K.: SEP VANGOFRAPOJ. (Romano) 21 cm, 148 p. Prezo: 15,- gld.
Senlabora junulo per gazetanonco deklaras, ke dum tuta semajno li ĉiutage vangofrapos la plej riĉan britan fabrikposedanton, kaj la minaco ne estas senbaza, ĉar la sagaca junulo sukcesas pri sia entrepreno. Kompreneble ĉio ĉi okazas inter tre amuzaj cirkonstancoj...

Benczik, V. (red.): HUNGARA ANTOLOGIO. 24 cm, 447 p. Bindita. Prezo: 57,- gld.
Pli ol 200 literaturaj pecoj, donantaj superrigardon pri la evoluo de la hungara literaturo ekde la 11a jarcento ĝis la nunaj tagoj.

Elem, J.: BETONTERAPIO. (Dramo) 21 cm, 35 p. Prezo: 6,- gld.
Absurda dramo, plurfoje sukcese prezentita en la Budapeŝta Teatra Festivalo. Kun paralela hungara teksto.

Gajdar, A.: TIMUR KAJ LIA TAĈMENTO. (Romano) 21 cm, 74 p. Prezo: 8,10 gld.
Kiel dum la milito la junpioniroj helpas la aĝajn parencojn de la soldatoj, batalantaj en la fronto – tion priskribas verve kaj interese Gajdar, profunda konanto de la infana animo

Gáll, I.: OBSEDITA DE L' SUNO. (Romano) 21 cm, 186 p. Serio „Hungara Literaturo" n-ro 2. Prezo: 16,50 gld.
Tiu ĉi modernforma romano rakontas la vivon de hungara virino inter la jaroj 1944-1970, kiu estis persekutita en 1944 pro sia raso, en 1949 pro sia patro, en 1957 pro sia edzo, kaj nur en la sesdekaj jaroj ŝi trovas harmonian vivon. Sed kiu redonos al ŝi la perditajn jarojn...?

Heltai, J.: LA MORTO KAJ LA KURACISTO. (Novelo) 21 cm, 18 p. Prezo: 1,80 gld.
Sprita novelo kun paralela hungara teksto pri kuracisto alvokita por kuraci la malsanan Morton.



József, A.: URBORANDA NOKTO. (Poemaro) 21 cm, 141 p. Serio „Hungara Literaturo" n-ro 1. Prezo: 13.80 gld.
La volumo enhavas ĉ. 70 poemojn de la plej elstara figuro de la ĉijarcenta hungara poezio. Kelkaj poemoj aperas en pluraj tradukoj.

Karinthy, F.: VOJAĜO AL FAREMIDO – KAPILARIO (Du romanoj.) 18 cm, 182 p. Prezo: 13,80 gld.
Ambaŭ romanoj revivigas Guliveron, vojaĝigante lin al fantaziaj landoj.

Kemalov, n.: NAŬ JAROJ EN LA INFERO. (Rememoroj) 21 cm, 111 p. Prezo: 12,- gld.
Vigle, atentokapte verkitaj rememoroj de bulgara esperantisto pri jaroj pasigitaj en faŝisma koncentrejo.
Móricz, Zs.: MALRIĈAJ HOMOJ. (Rakonto) 24 cm, 26. Prezo: 2,40 gld.
Animskua rakonto pri soldato, kiu reveninte el la fronto daŭrigas la murdadon en sia vilaĝo.

Móricz, Zs.: VARMEGA KAMPARO. (Romano) 21 cm, 169 p. Prezo: 18,- gld.
La atentokapta verko, utiligante la rimedojn de la detektiva romano, akre kritikas la meznobelaron de la intermilita Hungario.

Tabi, L.: LA DAMO DE L' FATALO. (Komedio) 21 cm, 43 p. Prezo: 6,60 gld.
Ĉu estas konsilinde edzinigi virinon, apud kiu en la nupta nokto mortis jam du edzoj inter nekiaraj cirkonstancoj – jen la baza temo de tiu ĉi amuza komedio, sukcese ludita en la Budapeŝta Teatra Festivalo.



Petőfi, S.: JOHANO LA BRAVA. (Popolfabelo en versoj) 21 cm. 60 p. Prezo: 12,- gld.
Klasika peco de la hungara literaturo, kiu en la brila traduko de Kalocsay jam konkeris ankaŭ Esperantujon.

C) PRI LA LINGVO, PRI LA ESPERANTA LITERATURO KAJ MOVADO

Barna, Z.: LA LABORISTA ESPERANTO-MOVADO EN HUNGARIO 1913-1934. 21 cm. 190 p. Prezo: 18,- gld.
Elstara scienca analizo pri la plej glora periodo de la hungara esperantista laborista movado.

Benczik, V.: (red.): BAZA LITERATURA KRESTOMATIO. 19 cm, 282 p. Tria eldono. Prezo: 13,80 gld.
Originalaj verkoj de 59 Esperantaj verkistoj ekde Zamenhof ĝis la nuntempo, kun biografiaj notoj pri la aŭtoroj.

Blanke, D. (red.): SOCIPOLITIKAJ ASPEKTOJ DE LA ESPERANTO-MOVADO. (Studoj) 19 cm, 228 p. Prezo: 13,80 gld.
Studoj de elstaraj esperantologoj. La volumo enhavas ankaŭ la faman verkon de U. Lins: „Esperanto dum la Tria Regno".

Bleier, V. – Kökény, L. (red.): ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO. 24 cm, 600 p. bindita. Prezo: 45,- gld.
La plej kompleta konsultlibro pri la heroaj unuaj jardekoj de la Esperanto-movado inter 1887-1934.

Kalocsay, K.: DEK PRELEGOJ. (Literaturaj eseoj) 21 cm, 126 p. Prezo: 13,80 gld.
La volumo enhavas ĉefe aliloke neaperintajn priliteraturajn prelegojn de Kalocsay, krome ankaŭ lian klasikan studon pri la Esperanta vortfarado.

Kalocsay, K.: KIEL VERKI KAJ TRADUKI POEMOJN? (Du studoj) 21 cm, 27 p. Prezo: 1,80 gld.
La kajero enhavas la studojn „La esperanta ritmo", kaj „Pri la esperanta ritmo". Legi ilin tre utilas ne nur por verkantoj, sed por ĉiuj, kiuj volas ekkoni la propran Esperantan normaron pri rimo kaj ritmo.

Pechan, A. (red.): GVIDLIBRO POR SUPERA EKZAMENO. 19 cm, 358 p. Prezo: 15,- gld.
La populara studlibro konsistas el tri partoj: la unua pritraktas la historion de la Esperanto-movado, la dua la historion de la Esperanta literaturo, la tria la metodikon de la instruado de Esperanto.

D) DIVERSAJ TEMOJ

BARANYA, LA MISTERA. 21 cm, 44 p. Prezo: 3,60 gld.
La kajero prezentas unu el la sudaj departementoj de Hungario.
Barcsay, Zs. (red.): METODIKO EN LA PRAKTIKO. (Artikolaro) 21 cm, 140 p. Prezo: 15,90 gld.
La volumo enhavas kontribuaĵojn de pedagogoj mem instruantaj Esperanton – tial la temoj de la artikoloj vere tuŝas la plej praktikajn kaj plej aktualajn problemojn de la instruado de Esperanto.
133 TAGOJ. (Antologio) 19 cm, 244 p. Prezo: 12,- gld.
Literaturaj kaj aliaj verkoj pri la Hungara Konsilia Respubliko, la unua hungara proleta ŝtato, vivinta dum 133 tagoj en 1919.

Cvetkova, V.: VOJAĜIMPRESOJ PRI JAPANIO. 21 cm, 84 p. Kun kolora frontpaĝo kaj ok paĝoj da koloraj fotoj. Prezo: 12,- gld.
La aŭtorino raportas pri sia prelegvojaĝo en Japanio freŝe, agrable, la leganto kvazaŭ mem trapasas kun ŝi la belan vojaĝon. Kun abundaj informoj pri la ĉiutaga vivo de japanoj.
Dinnyés, J.: AL VENKO! (Kantaro kun muziknotoj) 21 cm, 24 p. Prezo: 6,- gld.
Propraj kantoj de la populara hungara popkantisto, antaŭ kelka tempo debutinta en Esperanto, krome kelkaj originalaj Esperantaj poemoj, kiujn li mem muzikigis. Ekzistas ankaŭ kasedo kun tiuj ĉi kantoj.

EKOLOGIO KAJ EKONOMIKO (Studoj) 21 cm, 94 p. Prezo: 9,- gld.
Kolekto de prelegoj, prononcitaj en Budapeŝta scienca konferenco.

Révész, S. (red.): DILEMOJ DE LA NUNTEMPO – VIDE EL HUNGARIO. (Studoj) 21 cm, 104 p. Prezo: 12,- gld.
Studoj de elstaraj hungaraj sociologoj kaj ekonomikistoj pri la ekonomiaj kaj sociaj ŝanĝoj okazantaj lastatempe en Hungario.

SCIENCAJ KOMUNIKAĴOJ (KEMIO). 24 cm, 96 p. Prezo: 9,- gld.
Studoj pri diversaj aspektoj de la kemiaj sciencoj.

TURISTA KANTARO. 21 cm, 84 p. Prezo: 8,10 gld.
51 kantoj, plejparte internacie konataj, kun muziknotoj.

Junularo konferencis

La 18an kaj 19an de novembro konferencis en Székesfehérvár Hungara Komunisma Junulara Asocio. La Konferenco skizis la sekvindan strategion de la Asocio en la nova politika situacio de Hungario, kiam aperis pluraj diverstendencaj junularaj organizoj, prezentantaj signifan konkurencon. La Konferenco akceptis diskutmaterialon cele al preparo de la venontjara, 12a Kongreso de la Asocio.

La Konferenco ankaŭ elektis novan ĝeneralan sekretarion: Imre *Nagy*, 31 jaran matematikiston. (Lia nomo nur hazarde identas kun tiu de la iama ĉefministro.)

Sur nia foto: grupo de diskutantaj gejunuloj en la Konferenco.

ASTA kongresis en Budapeŝto

Fine de oktobro kongresis en Budapeŝto ASTA (Amerika Societo de Turismaj Asocioj), potenca internacia turisma organizaĵo. Ĝin partoprenis ĉ. 6 mil personoj el preskaŭ cento da landoj.

La Kongreso mem estas grava turisma evento, sed ĝia vera signifo por la gastiganta lando kaŝiĝas en tio, ke post tiaj kongresoj ordinare ege kreskas la organizita turismo al la koncerna lando, kompreneble nur se la partoprenintoj de la Kongreso – ĉiuj turismaj fakuloj – havis agrablajn impresojn dum la Kongreso.

Sur nia foto: la reprezentantoj de la hungara registaro kaj tiuj de ASTA malfermas la Kongreson.

Nova ĉefministro

Fine de novembro la hungara parlamento elektis novan ĉefministron anstataŭ la demisiinta Károly *Grósz*, kiu fine de majo elektiĝis ĝenerala sekretario de la Hungara Socialisma Laborista Partio, kaj jam tiam promesis forlasi la ĉefministran seĝon antaŭ la jarfino.

La nova ĉefministro fariĝis Miklós *Németh* (40 jara), ekonomikisto, ĝis nun sekretario de la CK de la Partio, membro de la Politburoo. Samtempe elektiĝis „ŝtatnistro" (senpostena ministro) Rezső *Nyers* (65 jara), kiu estas rigardata kiel „patro" de la hungara ekonomia reformo.

Sur nia foto: Rezső *Nyers* kaj Miklós *Németh* ĵuras je la Konstitucio.

Parado de husaroj

Lastatempe en Hungario ĉiam pli ofte okazas aranĝoj, kiuj celas teni vivaj la historiajn tradiciojn de la hungara popolo. Aŭtune en Budapeŝto okazis eĉ internacia renkontiĝo de husaroj, kiun partoprenis ankaŭ la reprezentantoj de la ankoraŭ funkciantaj husaraj regimentoj de diversaj naciaj armeoj el Eŭropo (Francio, Portugalio ktp.). La kunvenintaj husaroj – plejparte en historiaj uniformoj – faris imponajn paradajn marŝojn en diversaj punktoj de pluraj hungaraj urboj, je la ĝojo de la tie vivantaj hungaroj, kaj kompreneble por distri ankaŭ la eksterlandajn turistojn.

Sur nia foto: unu el tiuj aranĝoj.

Tiu ĉi romano de Nemere lanĉas rekte neniun etikan problemon — ĝi estas ĝisosta aventura romano, en kiu ĉiupaĝe okazas io, kio firme gluas la leganton al la fotelo. Svarmas en ĝi netimigeblaj viroj, kiuj havas durajn pugnojn kaj krakantajn pafilojn — kaj ili ne hezitas uzi tiujn en ajna momento. Tamen, kerne de la aventuro la atentema leganto malkovros profundan amaron, sentatan pro la senskrupuleco de la t.n. „granda politiko"...

István Nemere: Vivi estas danĝere. Originala romano. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1988. 159 p., 21 cm. Prezo: 21,- ned. gld. (Por Hungario: 90,- forintoj.).



Ĉu oni rajtas mortigi homon, kiu suferas je nesanigebla malsano, kaj mem petas la helpon de iu el siaj geamatoj por transpaŝi la sojlon de ekzisto kaj neekzisto? Entute, kial homo malsana kaj senpova ne rajtas libere disponi pri sia morto, dum fiziologie sanaj memmortigantoj suverene decidas pri tio... Tiun doloran problemon lanĉas kaj pritraktas la nova verko de la populara prozisto, kun lerta kombinado de motivoj de la socia, psikologia kaj detektiva romanoj.

István Nemere: Dum vi estis kun ni. Originala romano. Eldonis Oy Mendoservo Ak (Finnlando) kaj Hungara Esperanto-Asocio. Budapest, 1988. 165 p., 21 cm. Prezo: 24,- ned. gld. (Por Hungario: 80,- forintoj.)

revuo de revuoj

Mi volonte vizitas cirkon por plezuri kaj surprizite buŝon malfermi vidante akrobatojn sur bestoj kaj trapezoj ŝajne senpeze saltadi. Same mi volonte legas (ĉu vere? – noto de Red.), sed eble malpli plezure akrobataĵojn en E-gazetoj (aŭ en dissenditaj broŝroj) sur paĝoj senpeze impresaj saltante sur paciencaj vortoj (foje vostoj) de nia lingvo Esperanto, por iom dresadi ilin laŭ la kanto de la verkanto. Mi do apartenas al tiuj, kiujn distras tiu tradicia Esperanto-fenomeno. Foje mi ekmeditis – sekvinte tiun tradicion – kiel plifaciligi la E-lernadon al... ekzemple al Indonezianoj! Tio ja devas esti nepre tasko de Budapeŝtano: igi pli agrabla kaj senĝena la strukturon kaj vortaron de Eo al la insulanoj, helpi tiel la internaciigon. Mi jam redaktis tabelojn por klarigi al la estimata Akademio, kiel oni devus modifi, kaj transformi E-on al vere simpla, paca, do Pacifika I. L. – baldaŭ mi elpaŝos kun science skizitaj artikoloj en pluraj E-gazetoj de Javo, Sumatro kaj Bali-insulo (la tie kutiman florkronon ili bonvolos pendigi ĉe mian kolon).

Kial ne – se en Mez-Eŭropa E-gazeto nia diligenta Bernard Golden konsideras ĝena kaj kaosa nian vortaron el vidpunkto angla kaj hispana. Nur pro tio, ĉar „malsimetrioj" laŭ li malfaciligas por ili la E-lernadon. Kiu rajtas dubi, ke tiaj kaose komenciĝantaj vortoj: respondi, ricevi, rakonti, k.a. malhelpas anglojn kaj hispanojn? Ja en iliaj lingvoj tiuj bedaŭrindaj verboj komenciĝas (dankon al la spirito de tiuj lingvoj) per unusama silabeto! La logiko (de tiuj spiritoj) diktas do: jen kaoso en Esperanto! (ESPERANTISTO SLOVAKA, 2.)

Kial logiko? Jen, pri kio indas iom pli vaste paroli, precipe se oni emas anstataŭigi la necesajn trajtojn de Esperanto – klareco, belsoneco, homonimeco kaj aliaj – per certa logiko-sistemo. Tiu ĉi kompreneble ne nepre sekvas la Fundamenton, jam radikiĝintan en la historio, inter aliaj pro tio, ke la faktoroj, konsistigantaj Esperanton laŭ Fundamento, havas diversajn rangojn en la lingva plukonstruado. Pri tio Eugéne de Zilah prudente prezentis tre pripensindajn klarigojn en LA GAZETO (16.), alvokante por distingi bone dum lingva evoluigo. En tiu kunteksto la logiko ne regas, sed servas elekti laŭ la principoj ene de la Fundamento kaj apliki ilin sen perforti nian lingvan bazon. Kaj precipe ne „avantaĝe al iaj etnolingvaj preferoj. Estas bedaŭrinde, ke jen ie, jen aliloke, troviĝas samideanoj (fakte malsam-ideanoj), kiuj ne emas akcepti, ke nia lingvo jam maturiĝis – estas adolta! Pro tio daŭre aperas lokaj deziroj por alklini Esperanton al la propraj gustoj kaj etnaj pensmanieroj, Indas rekomendi: kun tia intenco bonvolu korekti plej unue vian patrinlingvon, ĝi tutcerte enhavas multe pli da kaoso kaj eroj korektindaj!

Longedaŭraj kursoj estas konataj kie okazas perturboj pro ne orda ĉeesto, pro malsama diligento kaj forgesemo. En la hungara urbo Hatvan docentino Viktória Balogh organizis por manpleno da gimnazianoj intensan kurson dum 4 tagoj dek horojn instruante-lernante. BUDAPEŜTA INFORMILO (9.) informas, ke la severan disciplinon akceptintaj lernantoj fine de la kurso jam kapablis bone traduki el Eo kaj en Eo-n, koncepti parkere 8-10 frazojn laŭ ĉiutagaj temoj, kompreni kaj koncizigi la legaĵojn. La bone pripensita studplano kaj metodo, la daŭra paroligo de la lernantoj akiris ne troigeblajn bonajn rezultojn.

Kun pli bela aspekto – ekstere kaj interne – renoviĝis, espereble daŭratempe BULGARA ESPERANTISTO (9.), kiu cetere fariĝas 70-jara, havante tamen pro konataj kaŭzoj militaj nur 57 jarkolektojn. Mem la presado okulfrape pliklariĝis kaj plivariiĝis. El tiu pli moderne produktita numero mi mencios ne nur la bone sukcesintajn fotojn. Plaĉas aparte la Jubilea kanto pri Esperanto de Simeon Simeonov kun la muziko de Dimitar Terziev, kun la partituro por ĥoro kaj piano, kaj enhave seriozas la historiaj rerigardoj al E. Privat, kaj al la Litoviaj jaroj de Zamenhof, kun la celo preciziĝi certajn ne malgravajn detalojn ĝuste dum la lastaj jaroj antaŭ la eldono de la Unua Libro. Interesan leteron pri Bulgaria afero mi legis en MONATO (10.), fare de la konata matematikisto-aŭtoro Petko Arnaudov, rifuzanta pli furan artikolon, kiu rilatis al tiulandaj turkoj. Bedaŭrinde liaj ĝustigi volantaj frazoj malhavas la matematikan precizemon. Se antaŭ jarcentoj dum la turka-otomana jugo multaj familioj pro la perforto iĝis muzulmanoj, turkigante ankaŭ siajn nomojn, post la forigo de la jugo ili havis eblon – tutcerte! – rekristaniĝi kaj re-aliĝi al la aliaj bulgaraj popolanoj. Estas ne verŝajne, ke la reĝa (cara) aŭ la socialisma regado tion malhelpis, tamen ili (ĝis nun) tion ne intencis!? Ili do iĝis eventuale turkoj? Kiu estis ilia hejma lingvo? – pri tio ni ne legas mencion; ĉu la turka? La nebula frazo: „restarigi la historian veron" lanĉas la demandon: ĉu tiucele oni (ĝuste jarcenton post la liberiĝo) proponis „reakiri siajn bulgarajn nomojn"? Ne legeblas, ĉu tiuj familioj efektive konis siajn iamajn nomojn, eble ili „elektis" iun konvenan?), kaj sendube malpliigis la statistikon de la turka minoritato al kiu ili apartenis. Cetere: ĉu ne indas vivi tie kun nomo kroata aŭ turka aŭ greka? Do ĝuste pri la veraj cirkonstancoj silentis la letero, kaj tion mi ne povas konsideri tre internacieca.

Ervin *Fenyvesi*

METIAJ KONTRIBUAĴOJ AL MEDIOPROTEKTO

Ĉie ajn pli kaj pli multiĝas la trafiko de la veturiloj, traktoroj, ankaŭ eksplodmotoraj maŝinoj en la industrio. Dum ilia funkciado nia aero daŭre kaj akcele pli poluciiĝas, malavantaĝe ŝarĝante nian vivmedion — kaj ne sole la aeron, sed memkomprenеble ankaŭ la grundon kaj ĉiujn surfacojn. Sekvante la teknikajn strebojn tra la mondo kontraŭ tiu malagrabla fenomeno, kaj paralele kun la landa ekonomia tendenco, la *Industria Etkooperativo KLIMA* decidis pli rapide disvolvi la teknikan nivelon kaj aparte labori favore al la medioprotekto pere de siaj produktoj. Tiuj penoj inkluzivas certagrade modifi la produktogamon, nepre levante daŭre la strukturan konstruon kaj la kvaliton de la varoj por firmigi la konkurkapablon sur la internacia merkato.

Tiurilate estas menciinde, ke la kooperativo laboras efike sur tri teknikaj kampoj, inter kiuj elstaras la industriaj klimatiziloj — plej ofte fridigiloj. Niaj tiucelaj fabrikaĵoj estas vaste uzataj en la branĉoj de la nutraĵindustrio, ekzemple en la viando-industrio, lakto-industrio kaj konservado. Same delonge ni projektas kaj fabrikas benzin-provizejojn, staciojn (ankaŭ por aliaj brulmaterialoj), inkluzive ties partojn kaj erojn, muntante kaj prizorgante ilin tra la lando.

Preskaŭ pasis du jardekoj, de kiam la kooperativo fabrikas aerfiltrilojn por eksplodmotoroj de enlande vaste uzataj kamionoj kaj laborveturiloj (Ikarus, Rába, IFA, ZIL). Por interesiĝantoj de medioprotekto estos ne neglektinde legi pri la efektoj de tiaspecaj fabrikaĵoj al la medio, kaj ekkoni, ke per tiaj rimedoj oni povas vere tre avantaĝe ŝirmi nian tiom gravan vivĉirkaŭaĵon.

La fumgas-emisio de la eksplodmotoro grave influeblas per filtrado de la ensuĉata aero. Ĝuste pro tio oni devas atribui grandan zorgon al la konvena aerfiltrado, ne laste pro tio, ke tiel eblas grave plilongigi la vivdaŭron de la maŝino, krome ankaŭ ĝian rendimenton kreskigi. Ke tiuj avantaĝoj multe gravas por la uzantoj kaj posedantoj de la motoroj, estas ekster dubo. Indas tiurilate mencii, ke en Hungario la trafikon partoprenantaj veturiloj estas ekipataj per tradiciaj — ne komplete efikplenaj — aerfiltriloj (Ikarus, Skoda, IFA, ZIL k.a.).

En la jaro 1980 — sekvante la pli severajn medioprotektajn preskribojn — ni disvolvis novtipajn — altefikajn — tipojn de aerfiltriloj. Tiam la kooperativo ekfabrikis en grandaj serioj la *aerfiltrilojn kun paperenmetaĵo.* La fabrikado kreskis de jaro al jaro, kaj ĉi-jare ni produktas jam pli ol 20 mil tiajn aerfiltrilojn.

Malgraŭ la rapida sukceso de niaj paperenhavaj aerfiltriloj, samtempe ni ekigis la disvolvon de la filtra kompletigilo, tio signifas la modernigon de la aerfiltrado. Temas pri la „ciklonaj" antaŭfiltriloj.



Antaŭfiltrilo de veturila kompleto



Aerfiltrilo por veturilo, kun paperenmetaĵo kaj ciklona antaŭfiltrilo



Aer-ensuĉa tubo

La antaŭfiltrilo havas ĉiam la taskon, malhelpi la eniĝon de grandaj malpuraĵoj, de la pli grandaj polveroj kaj polvograjnoj. La paperenmetaĵoj de la ĉeffiltrilo – pro siaj surfaco kaj specialaj filtroefikoj – kapablas malhelpi la penetradon de polveroj eĉ plej etaj (5-10 nm).

La tiel protektata aero penetranta en la motoron igas pli sekura la motoran funkciadon, la pli perfektan forbrulon de la materialoj. Sekve grave malpliiĝas la emisio de la karbodioksido, de la fumgaso, kiujn oni devas konsideri kiel la plej gravaj, do plej malagrablaj kaj minacaj aerpoluciaĵoj.

Dum la lastaj jaroj ni disvolvis por la motoroj de la IKARUS-aŭtobusoj – uzataj en urboj kaj sur landvojoj – aerfiltrilon kun paperenmetaĵo kapabla tralasi 10 m^3/minuto, kio estas malofta trajto sur la merkato, tiucele. Same estas konsiderata granda teknika sukceso la aerfiltrilo kun sekuriga enmetaĵo por la traktoroj Rába-Steiger, ĉar ĝi filtras 16 m^3/minuto; ĝi igis superflua amasan importon, samkiel la aerfiltrilo-kompleto por la ŝarĝaŭtoj fabrikataj de MÁVAG. Tiu ĉi sistemo konsistas el paperenhava ĉeffiltrilo, aerkondukilo kaj antaŭfiltrilo, kaj ĝi kapablas filtri ĉiuminute 19 m^3 da aero.

Ŀa pliintensigata medioprotekto postulas pli kaj pli da teknikaj novaĵoj koncerne la tiom grave poluciantajn eksplodmotorajn veturilojn. Nia kooperativo pro tio alcelis la disvolvon de pli modernaj, pli tralasaj antaŭfiltriloj, kiuj laŭgrade estos ekfabrikataj.

Kiel supre jam menciite, la kooperativo forte partoprenas ankaŭ en la fridiga tekniko, projektante, fabrikante kaj muntante la plej diversajn fridigilojn. Oni nepre ne forgesu, ke tiuj instalaĵoj – akvon refridigaj turoj, vaporigaj kondensujoj, termotransigiloj k.c. – laŭfunkcie kontaktas daŭre la ĉirkaŭaĵon. Ili forprenas aŭ prezentas varmoenergion en la medio, tiel neeviteble ŝanĝante ties staton; la tiucele uzataj transigaj maŝinoj – pumpiloj, ventoliloj – emisias bruon same en la medion, do ankaŭ tiurilate la medioprotektado devas turni grandan atenton.

Kaj vere, estas rekomendinde atenti almenaŭ la sekvajn priskribi-



Ĉeffiltrilo kun paperenmetaĵo



Peraera likvofridilo



Frid-turo por recirkuligi malvarmigitan akvon, kun centrifuga ventolilo

cojn, kiuj bezonas fermitan cirkuligon, ekzemple forte purigitan aŭ manipulitan akvon, frostorezistan likvaĵon kaj aliajn. La fridiga procezo okazas per la t.n. „humida aerŝanĝo", kiam aero estas kontraŭblovata al la surface defluanta, degutanta akvo. La eltiratan gravan termoenergion tiam forportas la kelkprocenta akvo vaporiĝante, aliflanke malvarmigante la restintan akvon (aŭ aliajn fluidaĵojn). Ankaŭ tiu metodo taŭge kontribuas al ŝparado de akvo.

En la menciitaj instalaĵoj havas gravan funkcion la ventoliloj, en si mem bruon kaŭzantaj maŝinoj. Ambaŭ instalaĵoj estas tre ofte uzataj en loĝataj lokoj, sekve tiu bruado multe perturbas la loĝantaron, fakte ĝi okazigas median poluciadon siavice.

Kaj nun ni okupiĝas pri tiaj eksperimentoj, en kiuj fridturoj kaj elvaporigaj kondensatoroj estas ekipataj per tiaj ventoliloj kies bruonivelo ne-

tajn produktaĵojn, se oni efektive interesiĝas pri la teknikaj bezonoj kaj ebloj de la medioprotektado.

La *frid-turoj* prezentas eblon por ŝpari akvon, kiu ja esta ne supertaksebla valoro de nia medio. Depost la komenco de la moderna industria evoluo ĉie ajn oni establis sennombrajn tiajn maŝinojn, kiuj uzas kondukitan trinkakvon por fridigi. Lige al tiu ankoraŭ ne plene evitebla fridado okazas la malŝparo, ĉar la tiel varmiĝintan akvon plejofte oni kondukas en kanalon, foje en aliajn akvejojn. Tiamaniere estas cetere damaĝitaj eĉ la vivuloj de la biologie aktivaj, do vivaj akvejoj.

Bonŝance, la plialtiĝanta prezo de la trinkakvo efikas kiel trudforto, kiu instigas al recirkuligo de la varmiĝinta akvo, helpe de refridigo. Tio okazas per konvenaj frid-turoj, kaj dume oni devas kompensi nur 2-3 procentojn de la cirkulanta akvomaso, pro la forvaporiĝo. La necesa energio estas – kalkulante unu m^3 da akvo/horo – ne pli ol 0,11 kW.

La *elvaporigaj kondensatoroj* – aŭ varmotransigiloj – servas por likvigi diversajn fridigajn substancojn – precipe amonion. Krome eblas per ili fridigi ankaŭ aliajn likvajn substan-



Frid-turo por recirkuligi akvon, kun laŭaksa ventolilo



Frid-turoj por akvo, muntita sur tegmento

niel superos 60 db. Tio plene kontentigas la severajn preskribojn de la medioprotekto, kaj espereble loĝantoj nenie plendos pro la bruo de niaj fridiloj, kie ajn tiuj estos establitaj.

Grave koncernas la medioprotekton ankaŭ la *gutoforigilo*, kiun ni disvolvis por ambaŭ supremenciitaj maŝinoj. Ĝi servas ĉe tiuj klimataparatoj por dispartigi el la pasanta aero la kunportitajn gutojn. Jam per tio la funkciado iĝas akvoŝpara; aliflanke tiu ĉi procezo vintre malhelpas la glaciiĝon ĉirkaŭ la maŝino. Estas facile imageble, kiajn danĝerojn kaj damaĝojn povas kaŭzi ekzemple la glaciiĝo de la elektraj kondukiloj, kiuj eventuale deŝiriĝas pro la glacieroj; kaj ŝajnas superflue aludi al la dumlaboraj danĝeroj pro la apudaj glacie glitaj trotuaroj kaj manipulejoj, por lasi senmencie la ceterajn minacojn kaŭze de la ĝenaj humideco aŭ glaciiĝo.

Do la gutoforigilo igas multe pli sekura la tutan funkciadon. Ĝi konsistas el injekte mulditaj plasto-platoj, rezistantaj kontraŭ kemiaĵoj. Ĝi tiel kapablas kapti kaj forkonduki ĉian kunportatan guton el la aerfluo, kiujn pro la rekta malavantaĝo oni devas ne tralasi en la aeron.

Apartan gravecon havas tiu *sengasiga* instalaĵo – konstruata laŭ patento de Mélyépterv-KLIMA firmaoj – kiu faras utiligebla la akvon de gasozaj putoj. Kaj la industrio, kaj la agrikulturo – pro geologiaj cirkonstancoj – multloke baraktas pro tiamaniere malfacile (aŭ tute ne) utiligeblaj akvoprenejoj; videblas do la vasta aplikeblo de tiu sengasiga aparato, denove tre favora por la ĝenerala medioprotekto.

Tradukis: Ervin *Fenyvesi*



Akvon sengasiga aparato

HUNGARA KABLO· FABRIKARO

·KABLO ·FABRIKO SZEGED



Sidejo de la kablofabriko

La Kablo-fabriko en Szeged estis establita en la jaro 1959, sekve de la ekonomia tendenco disvastigi la industrion en diversaj partoj de la lando. La fabriko bone enradikiĝis en la grandurbon de la Hungara Ebenaĵo, kaj baldaŭ eniĝis en la tutlandan entreprenon Hungara Kablo-Fabrikaro, kiel unu el ĝiaj memstaraj fabrikoj.

La fabriko rapide suriris la vojon produkti novajn varojn por la merkato. La plast-izolaj konduktiloj estas produktataj depost 1960, kiam oni instalis – parte transprenitajn de la Budapeŝta fabrikĵ, parte tute novajn – ekstrud-maŝinojn. La malnovaj fabrikejoj baldaŭ ne montriĝis sufiĉaj kaj konvenaj al la tre pretenda fabrikado de tiuj delikate farendaj konduktiloj. Tial oni decidis konstrui novan, modernan fabrikhalon; la konstruado komenciĝis en la jaro 1961, kaj daŭris eĉ post la parta finkonstruo, ĉar la forte kreskinta varopostulo de la en- kaj eksterlanda merkato faris nepre necese pli kaj pli ampleksigi la fabrikhalon. En la jaro 1971 ĝiaj dimensioj jam akiris la nunan grandecon, kaj de tiam senĉese kaj kontinue funkcias tie grandskala fabrikado.

Nuntempe la Kablo-fabriko Szeged okupiĝas pri produktado de plast-izolaj konduktiloj kaj kabloj por alttensia kurento, ankaŭ de telekomunikadaj kabloj. En la alttensiaj konduktiloj kaj kabloj la kurenton konduktas kupro, la izolaĵon konsistigas tegaĵo de polivinilklorid-plasto. Tiuj produktaĵoj estas utiligeblaj ĝis unu kilovolta tensio.

Kompakta kaj fleksebla kupraĵo konduktas la kurenton ankaŭ en la diversaj forttensiaj varoj, kiuj ricevas izoladon kaj normalan, kaj frost-, respektive termo-rezistan per polivinilklorida plastaĵo.

Gravaj produktaĵoj de nia fabriko estas la sekvaj elektraj varoj:

Fortkurenta munta konduktilo, kun kompakta kaj fleksebla





elektra konduktanto uzebla por servolineo
Konektaj konduktiloj de tipoj MT kaj MZS
Konduktiloj por veturiloj
MB-kabloj kun kupra konduktilo
Signalaj kabloj
Kabloj por gruoj
Kabloj por ŝipoj

Menciindas ankaŭ niaj telekomunikaj kabloj:

Lokaj telefonkabloj kun vazelina izolmaso
Regionaj kabloj
Samcentraj kabloj
Pendkabloj
Enmuraj kabloj
Konektaj kabloj (switch) kaj aliaj.

Ĝuste la fabrikado de la telekomunikaj kabloj rapide evoluas, kaj ĝi okupas pli kaj pli grandan proporcion ene de la tutfabrika produktado.

Ni menciu tiurilate, ke en kadro de la fabrikado de la telekomunikaj kabloj ĝuste la vazeline plenigita telefonkablo estis la unua produktaĵo en Szeged, almenaŭ unu el la modernaj tipoj. Cetere tiun kablo-tipon la Kablo-fabriko Szeged produktis kiel unua inter la landoj apartenantaj al la Konsilio de Ekonomia Interhelpo (KEI). Ne mirinde, ke pro siaj kvalitoj eminentaj kaj multe aprobitaj tiu varo ricevis Foiro-premion dum la Budapeŝta Internacia Foiro, krome Grandan Premion de la Industria Foiro de Szeged. Same premiojn ĝi atingis dum aliaj landaj foiroj, kaj marko-aprobon flanke de la Forumo de Eminentaj Varoj. Nuntempe nia fabriko disvolvis la produktadon ankaŭ al varianto kun pliigitaj ŝirmaj faktoroj.

Alia multe sukcesinta produktaĵo de la Kablo-fabriko Szeged estas la samcentra kablo, fabrikata laŭ la licenco de la franca firmao SAT.

Krom la interne plenigita telefonkablo kaj la samcentra kablo la Kablo-fabriko Szeged ekigis ankaŭ aliajn, pli kaj pli modernajn fabrikaĵojn. La sortimento de la fabrikaĵoj jam enhavas plurajn novtipajn telekomunikajn kablojn, kiuj estas tre necesaj por disvolvi al pli alta ŝtupo la telekomunikado-sistemojn, ankaŭ en Hungario.

Inter la aluditaj novtipaj telekomunikaj kabloj, kiujn Szeged ekfabrikis, efektive elstaras la regiona kablo per siaj utilaj trajtoj kaj uzebleco. Ne mirinde do, ke tiu nova varo akiris premion dum la Industria Foiro de Szeged.

Vasta eksterlanda merkato montriĝis merite kaj sukcese akirebla helpe de la novaj kaj diversajn celojn servantaj kablo-fabrikaĵoj, kiujn larĝaskale produktas la Kablo-fabriko Szeged enkadre de Hungara Kablo-Fabrikaro. Per tiuj ĝi fariĝis signifa industria faktoro de la hungara ekonomio, kaj prezentas jam firman bazon por la kreskanta eksportado de la hungara telekomunikaĵo-industrio, kaj same al la elektra industrio. En tiuj branĉoj la eksportantaj fabrikoj multrilate utiligas por alkonstruado al siaj produktaĵoj la multspecajn konduktilojn kaj kablojn de la Kablo-fabriko Szeged.

La fabriko akceptas mendojn ĝis la mezo de la jarkvarono por liveroj en la sama kvaronjaro. La entrepreno jam enkondukis cetere ankaŭ la pograndan komercadon siavice, eĉ jam la pomalgrandan vendadon.

En la kadro de la pogranda vendado ĉe la Kablo-fabriko prezentiĝas ebloj ankaŭ por prompta, respektive dum 30 tagoj plenumebla liverado, el la sekvaj varoj:

M 450/750 fortkurenta servokablo, kun kompakta konduktilo
MT 300/500 fortkurenta konekta konduktilo
MB 450/75 kablo
Signal-kablo

En la fabriko jam funkcias vendejo por pomalgranda servado de la produktaĵoj. En tiu vendejo de la fabriko kaj firmaoj, kaj la loĝantaro povas aĉeti por si la bezonatajn produktaĵojn de la Kablo-fabriko. Eĉ ankaŭ el produktaĵoj de aliaj fabrikoj de la Hungara Kablo-Fabrikaro oni povas elekti en tiu vendejo. Kompreneble la aĉetantoj abunde trovas tie ankaŭ malalttensiajn muntaĵojn por siaj profesiaj kaj ceteraj laboroj. Tiel plej volonte klopodas helpi al ĉiuj siaj partneroj kaj aĉetantoj la

Kablo-fabriko Szeged

RECENZOJ

Grava scienca verko – frukto de internacia kunlaboro

Esperanta-Latina-Ĉina Atlaso de Insekta Morfologio. Latina originalo de H. Steinmann kaj L. Zombori. Esperantigita, ĉinigita kaj reredaktita de Li Kexi. Ĉina Esperanto-Eldonejo, Beijing, 1987. 21 cm, 454 p.

Estis en 1981 ke ĉe Akadémiai Kiadó (eldonejo de la Hungara Scienca Akademio) aperis de H. Steinmann kaj L. Zombori la libro An Atlas of Insect Morphology donanta ilustraĵojn kaj anglajn kaj latinajn nomojn de la diversaj partoj de insektoj.

Legis pri tio en iu referanta ĵurnalo inĝ. Li Kexi, kunlaboranto de la Nordokcidenta Agrikultura Universitato, Yangling, Ĉinio, kiu tiam estis unu el la redaktoroj de la revuo Entomotaxonomia. Li petis min kiel malnovan amikon akiri al li ekzempleron. Ricevinte ĝin li decidis prepari version Esperantan-latinan-ĉinan. La Akadémiai Kiadó afable kaj senpage permesis la eldonon de tiu versio al la Ĉina Esperanto-Eldonejo en Pekino.

Post kelkjara intensa laboro, kiam rilate la Esperanto-tekston Li Kexi estis helpata per la rekomendoj kaj opinioj de la norvega C. Stop-Bowitz, la finna J. Jäntti kaj la hungaroj J. Bohár kaj iomete mi mem, dum la ĉinajn esprimojn kontrolis prof. Guan Zhihe de la Pekina Agrikultura Universitato, la libro titolita Esperanta-Latina-Ĉina Atlaso de Insekta Morfologio (ISBN 7-5052-0000-3/01) aperis en la Jubilea Jaro de Esperanto (eĉ se kun kelkmonata malfruo).

La 454-paĝa atlaso transprenis la ilustraĵojn kaj la latinajn terminojn el la menciita angla-latina Atlas kaj post iom da rearanĝo aldonis la ekvivalentajn terminojn en Esperanto kaj la ĉina lingvo. La libro havas ankaŭ tri laŭlingvajn indeksojn-vortarojn, do estas tre facile utiligebla por la fakuloj.

La ekstera aspekto de la libro estas bona kaj certe reputacio-veka. Do ĝi ne nur servas ĉine aŭ esperante sciantajn fakulojn, sed ĝi certe bone impresos ankaŭ aliajn neesperantistojn, fakulojn kaj nefakulojn. Ĝi aperis en 3000 ekzempleroj.

O. Haszpra
(Hungario)

„La multo de la malmulto"

Antologio de maltaj poetoj. Tr. el la malta C. Mallia. – Zabbar – Zagreb: La tradukinto. 1985. – 168 p.

Feliĉe, la libro estas nek nova bono, nek ia aparte brila prezento de eta popolo. Feliĉe,

ĉar teni en la mano juvelojn signifas apenaŭ spiri pro la admiro kaj elbalbuti „Oĥ!" kaj „Aĥ!" k.s. „En vian manon" – la tradukinto diris transdonante al legantaro antologion de maltaj poetoj. Do, kion mi tenas en mia mano, se ne aron da juveloj? Jam la unua verko La „mio" kaj lia pretero de tiu Dum Karm restigas senton de io ne finita. Kohere ne finita – se eblas tiel diri, ĉar dirante la vorton de l' aŭtoro „La penso furioziĝas, Ĉio ŝajnas al li senvalora". Ne necesas koni la maltan lingvon por kompreni, eksenti la teruran streĉon de traduko el la menso en vortojn. Ne eblas glate kaj juvele vorttraduki en ajnan lingvon tiom pezajn pensojn, per kiuj menso „bastonete frapetas vojon" por ne marŝi cirkloresone inter klišoj kaj stampoj, sed trovi novan vojon. Vole aŭ nevole la tradukinto transdonis pezan laboron de la originalo. Io raspa, malglata kaj peza sentiĝas en tiu... nu, mi diru, pavimŝtono sekva, sed ne la lasta en la senfina Vojo. Komuna vojo. Ĉu maltaj poetoj, ĉu ĉinaj, ĉu amerikaj, ĉu pure esperantistaj. La irontoj finpoluros tiun ĉi ŝtonon.

Entute la verkaro prezentas komunhoman temaron. Tial propre malta historio nur fonas cedante al la nuna kaj futura problemaro de la popoloj, al vasta horizonto. Ĉiam la poetoj prilumas la Vojon. Videblas, en komparo kun la mondliteraturo, ke la maltaj poetoj ne faras tion sufiĉe lerte (legu – bizare). La formo, ritmo, rimaro aludas ion, kio valoras por ĉiu homo el iu ajn kulturo. Esperantigo de la malta poezio vere simbolas la strebon al la tutmonda komunumo. Kvankam ne ĉesis esti aktualaj la linioj:

Patrinan lingvon kial li forĵetis,
troa amant' de lingvo alilanda?

Ĉi linioj tiritaj el la libro emfazas, ke luktante por sia, eĉ la plej eta lingvo, ĝiaj portantoj celas meti lepton, enplekti sian fadenon en la komunan plektaĵon. Pliriĉigante ĝin. Por ke estu (mi denove kaj volonte citas):

La multo de la malmulto

Viktor Sapoĵnikov
(Sovetio)

Kiam vino eniras – saĝo foriras

Hua Ĝjun'u. La fiera generalo (Tr. el la ĉina Laŭlum; Adaptis, il. Te Ŭej. – Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo. 1985. – 22 p., il. Prezo por Hungario: 25,- forintoj.

„La fiera generalo" estas simpla historio, kiun rakontis Hŭa Ĝjun'u. Historio, kiu montras laŭetapan degeneron de persono. La unuaj paĝoj de la libro prezentas al la leganto fortikan viron, kiu posedas eminentan batalarton kaj eksterordinaran forton. Konformaj bildoj ilustras liajn kapablojn. Certe, neniu malamiko kuraĝis tiam invadi. Sed apud

ajna potenculo nepre troviĝas flatulo, kiu profitas el tiu proksimeco. Ĉiu nia protagonisto eskapas la flatparolojn de tiu subulo? Ja ne. ,,La Plej Granda Heroo en la Mondo" — tiu titolo plezurigas nian generalon. Kaj leviĝas grandventra vinvazo, kaj estas ĝi fortrinkata per unu tiro. Komenciĝas gaja karuselo de dibočoj, la militaj ekzercoj restas flanke. Fiero kaj honor-amo kreskas, kaj eĉ evidentaj malsukcesoj de l' generalo en pezlevado kaj pafado nenion instruis al li. Des pli, ke ĉiam proksimas trankviligaj vortoj de l' flatulo. Ankaŭ vino ebligas sinforgeson.

Kaj plu?... Venas tempo kvitiĝi. La malamikoj kuraĝas ataki la antaŭe nevenkeblan generalon kaj... sukcesas. La generalo provas eskapi, sed la malamikaj soldatoj lin kaptas. Tiel finiĝis la kariero de la ,,Plej Granda Heroo en la Mondo". Memoru: kio vi estas. La libro estas interesa por 5-9 jaruloj (ĉu ili multas en la Regno Verda?). Kvankam en la libro estas nenio eksterordinara, ja ni jam alkutimiĝis al buntaj nuancoriĉaj, esprimivaj bildoj en la porinfanaj libroj produktataj en Ĉinio. Sed el amaso de aliaj tiu ĉi rimarkindas per sia alireblo por ajna nacio, ja ne enestas personaj nomoj, foje komplikaj por neĉinoj.

Natalia Talankina
(Sovetio)

Ĉina vilaĝo simbolanta la mondon

CHUN-CHAN YEH: Montara vilaĝo: romano, Tr. el la angla W.Auld. — Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. — 266 p. — (Oriento-Okcidento, N-ro 21.)

Mirinda libro! En la plej simpla, sed neniom primitiva lingvo, la aŭtoro bildigas por ni la vivon de montara vilaĝo ĉina. Verdire, nur komencas bildigi pure ĉinan vilaĝon. Li faras tion ameme, kun anima varmo priskribas jen pejzaĝon pitoreskan, jen ŝanĝon de sezonoj, ĉiam trovante trafajn vortojn por la baza fono sur kiu li pli kaj pli detaligas la vivon de l' kamparano ĉina. Ĝis kiam tute nerimarkeble ni jam vidas simplan Homon starantan sur peco de tero, kiu nutras ne nur lin, sed multajn aliajn. Ritme pasas la sezonoj. La tempo laboras rutine kaj senĉese. La romano komenciĝas per kanto kamparana kaj per ĝi finiĝas emfazante la intiman ligon de homo semanta kun la tero donanta.

Sendepende de diversaj perturbaj eventoj. Produnda scio pri tiu ritmo brile speguliĝas en la romano, kiu ne plu temas pri la ĉina vilaĝo. La samaj aŭ similaj eventoj povas okazi ĉie. Kaj fakte okazis en la granda Rusio, samkiel en Francio, Belgio kaj eĉ sur bordoj rokaj de nordaj maroj kie oni nek semas, nek rikoltas, tamen nutras sin dank' al peco de arbaro aŭ maro. Aliaj moroj kaj kutimoj, sed la sama sinteno, la sama ligo kun la tero donanta nutraĵojn. En la romano de Chun-Chan Yen olda kamparano mortas batalante por la parcelo, samkiel multaj mortis en mialanda historio kaj en iu ajn historio orienta aŭ okcidenta, suda aŭ norda. Ĉie similaj homoj defendas sian rajton posedi sian parcelon por kreskigi tritikon, rizon, vinberojn, olivojn aŭ paŝti brutojn. Ne ekzistas diferenco, kaj oni bezonas nek Esperanton nek alian lingvon por kompreni la sintenon de la simpla homo. En iu ajn lingvo estu verkita ,,Montara vilaĝo", ĝi plej konvinke substrekos la komunecon, sed ne diferencon inter oriento kaj okcidento. La libro jam estas internacia, laŭ la senco, eĉ sen la lingvo internacia. Paradokse, ĝi neniom povas kontribui al la interkompreniĝo inter oriento kaj okcidento, ĉar neniam mankis al simpla terkulturisto tiu interkompreno. Nur diversspacaj parazitoj avidaj kaj ekstreme orgojlaj emas perturbi la grandan ritmon de la naturo. Dirante per la vortoj el la romano ,,simpla terkulturisto ne havas kampon por io alia ol semado kaj rikoltado". Tamen la romano servas la noblan ideon de la eldonistoj, ĉar ĝi ankoraŭ unu fojon en la plej elokventa formo emfazas mankon. Estas feliĉo por la lingvo internacia prezenti per si la plej internacian sintenon de simpla ia-ajn-kulturisto, kiam ĝi prizorgas sian terenon neniam strabanta oblikve kaj avide la najbarojn.

Viktor Sapoĵnikov
(Sovetio)

Enhave kaj laŭaspekte altkvalita libro



Eduardas Miezelaitis: HOMO. Poemciklo. Esperantigita el la litova fare de Petras Celiauskas. Vilnius 1986. 21 cm, 94 p. Bindita. Prezo por Hungario: 30,- forintoj.

Eduardas Miezelaitis (pr. Eduárdas Mjelajtis) estas popola poeto de Litovio, laŭreato de altgradaj naciaj kaj internaciaj ordenoj, kiu aktivas en multaj ĝenroj de poezio. Li naskiĝis en 1919 en laborista familio, studis juron kaj publikigis siajn unuajn verkojn en 1935. La verskolekton ,,Homo" li mem rigardas kiel programan verkon sur sia vojo de kreaj serĉoj. Pro ĝi la aŭtoro ricevis la Lenin-premion en 1962.

La verkon karakterizas humanisma patoso, la pasia atento de la poeto al granda temo — la homo. La unueco inter homo kaj lia patrino Tero, tio esta la supera metaforo, kiu trairas la poemojn:

De manoj — similaj al branĉoj de ulm'
.....(pĝ .15)
Miaj vejnoj — riveroj,
En kiuj la sango
Kvazaŭ akvo al Némunas
Strebas iĝante lavango,
Kaj fine Baltmaron —
La koron atingas fluante;
Matene ĝi kantas kaj ondas
En ruĝo pasia bolante. (pĝ. 19)

Lipoj — kvazaŭ la nesto,
kie vortojn la koro elkovas por si.
Tien ĉi por siesto
vortoj lacaj reflugas kaj sen emoci'. (pĝ. 34)

Mi gutet'
Estas en oceano ondante,
De l' homaro partet' —
Same forta kaj same malgranda. (pĝ . 69)

Kaj la vortoj de poeto, sekve, estas semoj, kiuj ĝermas kaj maturiĝas ĝis la rikolto por fariĝi poezia pano necesa por la homo. Rilate la vortojn de E. Miezelaitis tio vere estus dezirinda. Ili estas sentoplenaj kaj mildaj, kiam temas pri amo aŭ bildoj pri virino, ili fariĝas pli laŭtaj kaj insistaj en la versaĵoj pri detruado, senhumaneco, milito. La leganto sentas la esperon de la poeto por paca estonteco kaj la fidon al homa bono.

La versaĵoj montras diversajn, sed ĉiukaze poetajn formojn. La traduk-verko fare de Petras Celiauskas kontentigas altajn postulojn: pro la imponaj rimoj kaj ritmoj la leganto ne malofte emas deklami kelkajn strofojn. La eldonaĵon ornamas ilustraĵoj de Stasys Krasauskas, kiuj rilatas al la enhavo de la versoj. Tiel ,,Homo" de E. Miezelaitis estas kaj laŭenhave kaj laŭaspekte altkvalita, leginda libro.

Sabine Fiedler
(GDR)

Hispana kontribuaĵo al ,,Oriento-Okcidento"

Federacio García Lorca: „Sanga nupto" kaj, „La domo de Bernarda Alba" (du dramoj). Tradukis Miguel Fernández, aŭspiciis Madrida Esperanto-Liceo, eldonis Ediciones la Misma, Madrid 1987, 232 p., 155x210 mm. Se-

rio „Oriento-Okcidento" nro 23. Prezo neindikita.

La dudektria volumo en la prestiĝa serio „Oriento-Okcidento", aŭspiciata de UEA, estas du dramoj de Federico García Lorca, eble la plej renoma dudeka-jarcenta verkisto hispana. Malgraŭ la sufiĉe freŝaj estiĝdatoj (1933 kaj 1936) ambaŭ teatraĵoj montras per siaj konfliktoj similecon al antikva tragedio. La kontraŭantaj fortoj ne stireblas, ili kunpuŝiĝas kvazaŭ super la rolantoj kaj efikas frakase. En „Sanga nupto" fraŭlino ŝanceliĝas inter siaj edzinigonto kaj eksfianĉo. En „La domo de Bernarda Alba" kvin maturajn virinojn, enfermitajn hejme kun la patrino pro la okjara funebro post la patro, rodas seksdezirego al unu viro. La dramojn karakterizas granda drasteco de la konfliktoj, en „La domo..." esprimiĝanta pli rekte, en „Sanga nupto" kaŝanta sin plurloke malantaŭ simbola poezieco. La esenco de la kontraŭfortoj – en antikva tragedio ofte motivita destine – estas ĉi tie biologia. (Ne mirige, ke la komentinto multfoje interpretas freŭdisme.) La Lorca-aĵoj prezentas studon pri pasia volupto, metitan en tre interesan kadron kulturan, kiu ebligas ekscii iom pri homrilatoj kaj kutimoj en hispana vilaĝo de antaŭ kelkdek jaroj (ekz. pri aparteco de la vira kaj virina mondoj, pozicio de la patrino hejme, funebraj, fianĉiĝaj kaj nuptaj ceremonioj). La elekton por la serio do mi opinias trafa. Oni nepre danku la tradukinton kaj ĉiujn kunlaborintojn pro la peno konatigi la verkon al internacilingvanoj.

Mi tre ĝuis la tuton, kvankam dum la legado ne unufoje mi trovis nekutimaĵon. Tiu ĉi fenomeno kredeble tipas por la legado en Esperanto – ja plej ofte oni uzas Esperanton kiel neĉefan lingvon. Ekzemple, en „Sanga nupto" la tradukinto bezonis tri stilojn: „popolkantan" en kantoj, tre gravaj por la dramstrukturo (El la hejm' elirante * al la preĝejo, * memoru vin egala * al brila stelo.), „ĉiutagan" en akcesoraj dialogoj (Ĉu vi portas horloĝon? * Jes. * Ni devas reiri ĝustatempe. Kiel fore loĝas ĉi homoj!), „solenan", indan je tragedio, en dialogoj signifaj por la konflikto (Oni ne povas preni sur sin pli grandan punon ol bruli en silento). Videble la tri citaĵoj diferencas, kio pruvas, ke la tradukinto sukcesis. Aliflanke mi rekonas „popolecon" de kelkaj eroj, sed plurfoje la teksto aspektas raspe pro la komplikeco aŭ nekutima por mi uzo de vortoj, kio faras ĝin „malpopola". Tiel estas pri malklara sintaksa strukturo de la strofo: „Vekiĝu spozino! (neologismo por edziniĝonto) * Vin ornamos * la brančet' el amo * en florado plena. * Vin ornamos * ĉe la brančoj kaj trunkoj * de la laŭraro". Same estas pri la uzo de „ke" (ĉar?) en lokoj kiel: „Venu brunineto, ke roson pluvigas frostmatena vento". Foje oni parolas pri „nesufiĉe internacia stilo". Laŭ mia ŝajno temas pri neeviteblaĵo. Parolata Esperanto estas malofta. La grincetojn en oreloj de alilanda esperantisto kaŭzas diverseco de konceptoj pri la ĉiutaga lingvaĵo. Al la dezirata internacia stilo ni devas ankoraŭ longe strebi.

Por iom eksperimenti, mi faris eran legregistraĵon pri la dua dramo, notante la nekontrolitajn impresojn.

* Vi rajtas fari nenian plendon Venis la pliparto el la vilaĝaj homoj.

* Jes, sed por makuli mian hejmon per ŝvito el siaj subjupoj kaj la veneno
de siaj langoj.
(Trafa, suka esprimo!)

* Patrino, ne tiel parolu!

* Tiel endas paroli en ĉi damna senrivera loko, vilaĝo putohava, kies
akvon oni trinkas kun la timo, ke oni ĝin venenis.

(Mi preferus frazmelodion kun akcenta „tiel" fine kaj tiam „Endas tiel". Kial putohava estu damna? Eĉ se estas rivero, kutime ekzistas putoj. Duobla „oni" pezigas la frazon.)

* Kia ili postlasis la plankon!

* Tiel sama, kvazaŭ ĝin estus trapasinta kapra grego.

(En rapida frazinterŝanĝo mi forigus „tiel sama" – ĝi malpliigas dinamikecon.) Kompreneble temas pri tute subjektiva registraĵo. Kiom da legontoj tiom da estontaj impresoj! Cetere la legmaniero en Esperanto ŝajnas interesa esplortemo.

Necesas mencii ankaŭ la zorgan eldonlaboron. Oni provizis la tekston per elĉerpaj notoj. (Kelkfoje ili eĉ troas. Mi volonte informiĝas, sed interpreti mi preferas mem. Ekzemple la noton: „Ne hazarde, ke Adela prezentas al la patrino ĝuste tian ventumilon, kies simboloj koloraj ja havas vitalan sencon. Tiele la poeto sinteze elmontras ĉi personon" mi preferus en formo: „Ruĝo kaj verdo kelkfoje havas vitalan sencon". Paralela teksto, klariganta kion la aŭtoro volis efektive diri, pigrigas leganton, kion la literatura verko ne toleras.) La griztona „Guernica" de Picasso kaj frapaj ruĝaj literoj bone aspektas sur la kovrilo. Pleje ĝojigis min tamen tre malgranda nombro de preseraroj – vera raraĵo en Esperantujo!

Mi instigas ĉiujn al aĉeto de la libro

Wojciech Usakiewich
(Pollando)

Impona rikolto de okdek jaroj



ROZO KAJ GLAVO. Antologio. Originalaj poemoj de bulgaraj esperantistoj (1906-1986). Eldonis Sofia-Pres. Kompilis kaj la antaŭparolon verkis Canko Murgin. Enkonduka artikolo „Bulgara skolo en la Esperanto-Poezio" de Georgi Miĥalkov, la redaktoro. Formato: 23 cm, 338 paĝoj. Presita en la ŝtata Presejo „Balkan" en Sofio, 1987.

En 1987 j. en Bulgario estis zorgeme kompilita kaj bele eldonita renkonte al la glora datreveno en la historio de la Lingvo Internacia – la 100-jara Jubileo de Esperanto la plej ampleksa el la ĝis nun aperintaj antologioj similaj „ROZO kaj GLAVO", kien eniris la poemoj originale verkitaj en Bulgario fare de la plej famaj kaj talentaj E-poetoj de diversaj generacioj, de la komenco de nia jarcento ĝis nuntempo (1906-1986). Kiel sciigas la aŭtoro de la „Antaŭparolo", preparante „Antologion", ili havis en sia dispono pli ol 350 E-versaĵojn, el kiuj oni elektis 200. (Mi menciu enkrampe, ke la kompilinto mem estas fama E-poeto, aŭtoro de multaj diverstemaj, aktualaj, majstre verkiraj poemoj, la legantoj de ĉi eldono povos trovi kelkajn el ili sur la paĝoj de „Rozo kaj Glavo": „La perlo homara", „Lasta aspiro de la partizano", „Turista kanto" k.a.)

Akirinte ĉi Antologion, la diversnaciaj ŝatantoj havos bonŝancon konatiĝi kun falango de la naturdotitaj bulgaraj E-poetoj de diversaj generacioj (62 aŭtoroj). En ĉi brava poezia taĉmento antaŭiras la unua bulgara E-poeto Ĥristo Ĵjaĥovski (1881-1933), per kies du poemetoj – „Mia Amo" kaj „Malbenita tago" – komenciĝas la poezia parto de Antologio.

Tamen antaŭ la poezia parto la legantoj trovos du literaturesplorajn etudojn: la kompetentan, enhavoričan studon de G. Miĥalkov – „Bulgara Esperanta Poezio" (ĉ. 13 paĝoj) kaj jam menciitan supre „Antaŭparolon", kompare tute lakonan (eĉ ne 2-paĝan), sed ankaŭ informoričan kaj valoran, precipe por eksterlandaj E-legantoj. Ekzemple el ĉi lasta ili ekscios, ke ankoraŭ en la komenco de 30aj jaroj la Centra Estraro de BEA decidis eldoni honore al 50-jara jubileo de Esperanto (1937) la poemaron de bulgaraj E-poetoj. Sed, bedaŭrinde, tiu bela decido fiaskis pro tiama faŝisma cenzuro en Bulgario.

Malgranda aldona historia informo laŭtema: la plej unua „Bulgara Antologio" en Esperanto (tradukita) aperis en Sofio antaŭ pli ol 60 jaroj (1925 j.). Ĝia kompilinto estis unu el la pioniroj de la bulgara E-movado Ivan Krestanov (1890-1966) kaj la redaktoro de ĝia poezia parto (ĉar ĝi enhavis ankaŭ tradukitan prozon) estis Kolomano Kalocsay, kiu mem esperantigis por ĝi naŭ bulgarajn poemojn.

Certe, tiu „unua hirundo" estis sufiĉe modesta kompare kun multe pli postaj samspecaj eldonoj, ekz. „SEPTEMBRO ESTIĜOS MAJO" (1983); ĝi prezentis en E-tradukoj de dek famaj bulgaraj prozverkistoj (precipe en fragmentoj) kaj 15 poetoj, en kies verkoj estas – en diversaj

aspektoj – unusola temo: unua en la mondo kontraŭfašisma Septembra ribelo dum la jaro 1923 en Bulgario, ĝia kruela frakaso kaj posta sanga teroro, dum kiu pereis multaj plej noblaj kaj kuraĝaj filoj de la popolo, inter ili la famaj poetoj Ĥristo Jasenov (1889-1925), Sergej Rumjancev (1896-1925) kaj Geo Milev (1895-1925), murditaj de la fašistoj.

La centran lokon en ĉi Antologio okupas la poemo de Geo Milev „Septembro", kiu ludis grandegan mobilize-revoluciigan rolon en la batalo de la popolo kontraŭ la sanga malhoma fašismo kaj kies profeta akordo en la konkluda ĉapitro – „Septembro estiĝos majo" – donis la titolon al ĉi 197-paĝa Antologio.

Oni ne povas preteratenti, ke kronas ĝin po unu verko de la tri famekonataj E-poetoj: Dimitr Zlatarski, Asen Grigorov kaj Ĥristo Gorov, sinsekve: jam la menciita bonega poemo „Fajrego", „Danubo" kaj „Ribeluloj". Finfaras ĉi volumon precipe valoraj por eksterlandaj E-legantoj koncizaj „Notoj pri la aŭtoroj", kiuj, bedaŭrinde, tute mankas en la du postaj samspecaj bulgaraj eldonoj de 1985 kaj 1987.

Do pasis nur du jaroj kaj en 1985 SOFIAPRES eldonis novan E-Antologion s.t. „BULGARA NUNTEMPA POEZIO KAJ PROZO" (237 p.). Kompilis ĝin Ĥristo Gorov, koncizan antaŭparolon „Necesa atentigo" verkis Nikola Aleksiev.

Dominas en ĉi-tiu Antologio poezio: ĝi okupas 160 paĝojn (53 aŭtoroj) kompare kun 60 paĝoj (12 verkistoj) en la proza parto. La tutmonda E-legantaro, traleginte ĝin, havos eblecon konatiĝi kun la versaĵoj de tiaj famekonataj bulgaraj poetoj-klasikuloj, kiel Ĥristo Botev, Ĥristo Smirnenski, Nikola Vapcarov, Elizaveta Bagrjana, Ĥristo Radevski k.a. en majstraj tradukoj de Asen Grigorov, Ĥristo Gorov, Simeon Simeonov, Canko Murgin, Venelin Mitev, Violin Oljanov k.a.

Tamen plejparte oni trovos ĉi tie la novajn modernajn poeziaĵojn kaj prozaĵojn, aperintajn en la literaturo post la dua mondmilito.

Kaj nun ni denove transiru jam senpere al la plej freŝa samspeca eldono – al „ROZO KAJ GLAVO", precipe interesa por diverslandaj E-legantoj, ĉar ĉiuj poemoj en ĝi estas ne tradukitaj, sed originale verkitaj en Esperanto.

Tuj mi volas atentigi la legantojn, ke ĉi tie ili povos trovi la komplektigitan kaj pliperfektigitan (evidente de la aŭtoro mem?) klasikan poemon pri la kontraŭfašisma ribelo en 1923 „Fajrego en Septembro": ĉi lasta varianto enhavas 192 versliniojn, (la unua – 152), kaj la lasta estas multe pli emocia, esprimplena, korskua, trapenetrita per la fortega tutpopola indigno kontraŭ la malhomaj tiranoj kaj per la neretenebla impeto al libero. Tamen la ribelo finiĝis per kruela sanga frakaso:

Poste – hirtas pendigiloj,
ploras orfoj senazilaj...
Poste – caro kun fašistoj
puŝas landon al abismo...

Tamen lasta akordo (eta 4-linia epilogo „Ruĝas ondo") sonas optimisme, esperige:

La libera sun' subiris,
sed ĉielo fajron spiras –
kaj la luma ruĝa ondo
disvastiĝas tra la mondo.

Sendube, oni tute prave konsideras D. Zlatarski (Miti) la unua E-klasikulo en Bulgario. Kiel lerte, majstre li manipulas per esprimplenaj vortoj, metaforoj, komparoj, kiel obeemaj estas en liaj manoj poeziaj ritmoj, rimoj, kiel belsonaj, leĝeraj estas liaj poeziaĵoj, eĉ tristaj, seneperaj („Neĝo sur tomboj", „Eldorado", „Vojo de l' Homo", „Anĝelo de Oktobro"). Vera ĝuo estas legi, deklami ilin, admiri la majstrecon de l' aŭtoro. Kaj kiel profundsencaj estas ili – kiel ekzemple, „Apelo", dediĉita al Asen Grigorov. Ĉi-tiuj du talentaj poetoj-samaĝuloj (ambaŭ naskiĝis en 1903) „najbaras" en la Antologio: la bonega poemciklo de Grigorov (25 poemoj) sekvas tuj post la versaĵoj de „Miti" kaj ili respegulas longan (de 1925 ĝis 1977) periodon en la vivo de tiu nobla, puranima, bonkora homo, Asen Grigorov, karmemora kaj neforgesebla por multaj. (Mi havis feliĉon persone koni lin ekde unuaj miaj paŝoj sur E-kampo, multfoje renkontiĝi, iom kunlabori, sincere konversacii, gasti en lia gastama domo, kaj tio estas la plej kara el miaj rememoroj)...

Oni povus multe kaj detale paroli pri talentaj, majstraj, enhavoriĉaj poeziaĵoj de nia kara samideano Asen Grigorov, same kiel pri bonegaj versaĵoj de Ĥristo Gorov, Violin Oljanov, Simeon Simeonov, Canko Murgin, Georgi Miĥalkov, Venelin Mitev k.a., sed la limigita amplekso de tiu ĉi recenzo, bedaŭrinde, ne permesas tion.

Pri etaj (ne oftaj) korektistaj mankoj kaj malĝustaĵoj ni ĉi tie ne parolu – verŝajne ili estas neeviteblaj en iu ajn eldono...

Konklude: okaze de l' apero de la bela „ROZO KAJ GLAVO" oni povas sincere gratuli la bulgarajn kolegojn, kiuj kompilis, redaktis, korektis ĉi imponan, altnivelan Antologion, kaj al diverslandaj legantoj, ŝatantoj de E-poezio rekomendi nepre pliriĉigi siajn E-bibliotekojn per ĉi valorega kaj bone eldonita libro.

Nadija *Andrianova*
(Sovetio)

Transsaltu malaltan barieron

Zora Heide. GROTESKAJ DIALOGOJ: Skeĉoj originale verkitaj en Esperanto. – Stockholm: Författares Bikmaskin, 1985. – 72 p.

Al miaj kursanoj mi rekomendis viziti la ĉefan urban librejon, kie estas vendata kelkdeko da Esperantaj libroj el Hungario kaj Bulgario. Ili revenis malkontentaj, ĉar facilaj legaĵoj („Baza legolibro por komencantoj", „Amuzaj dialogoj", komiksoj) jam elĉerpiĝis, sed la verkoj de Nemere, Lorjak k.a. por ili estas dume tro malfacilaj.

Ni plendas pro nesufiĉa libroaĉetemo. Kio miriga? Malmultaj kapablas tuj transsalti tre altan barieron. Sed se malpli altaj barieroj apenaŭ ekzistas? Nesufiĉa trejniteco deturnas la komencantojn for de legado, el kio sekvas ĝenerale malalta lingva nivelo.

Kion fari? Unue – doni al la homoj ne nur elementan lernolibron, sed ankaŭ daŭrigan kun gradigitaj literaturaj tekstoj (kiel ĉe Auld „Paŝoj al plena posedo" aŭ Boulton „Faktoj kaj fantazioj"). Due – provizi la komencantojn per facila literaturo; ekzemploj: „Konversacia literaturo" de Andreo Ĉe, nunaj bravaj iniciatoj en Hungario kaj Jugoslavio. Trie – organizi perfektigajn kursojn „Enkonduko en legadon de la originala Esperanta literaturo"; tiaspeca komuna komentata legado okazis en la 24-a Balta Esperanto-Tendaro, Latvio, 1987.

La prezentata libro apartenas al la fako de facila literaturo. Ĝi konsistas el 14 koncizaj skeĉoj. Kelkaj el ili, juĝante laŭ la fotoj, jam estis surscenigitaj en Internaciaj Feriaj Kursoj.

La temoj: pli-malpli amuzaj dialogoj inter la geedzoj kaj iuj okazoj, ligitaj kun Esperanto. Kio estas oportuna, la scenejo bezonas preskaŭ neniujn dekorojn.

Kompreneble, oni ne povas taksi tiujn skeĉojn kiel beletraĵojn aŭ teatraĵojn. Sed por la komenco tio sufiĉas: la novuloj mem praktikos la lingvon, provludos, teatrumos kaj emos serĉi poste pli altnivelajn legaĵojn aŭ teatraĵojn. El tiu vidpunkto la libro estas tre utila kiel malalta bariero, kuraĝiganta por transsalto de pli altaj barieroj.

Aliflanke, oni ne povas ne bedaŭri pri banaleco de iuj pecoj kaj lokoj.

Ĉu mi mem pretas surscenigi iujn el la skeĉoj kun miaj kursanoj? Eble, kvankam ne certe.

Bonvenon al la „Groteskaj dialogoj"! Kaj bonvenon al estontaj libroj por la novaj civitanoj de Esperantujo!

Boris Kolker
(Sovetio)

Valora kantokolekto

Kantoj karmemoraj. Kompilis Konisi gaku, eldonis Japana Esperanta Librokooperativo en 1985, Sone-higasi 1-11-46-204, Kobori mansion Toyonaka, Oosaka-hu, Japanio. 60 p. 26 cm. Prezo 13,- gld.

Ricevinte tiun libron enhavantan la notojn kaj la tekstojn de 33 japanaj kaj 20 alilandaj kantoj, unue mi estis ravita pri la elstare altkvalitaj tekstoj. Alivorte, unue mi ĝuis la libron kiel kolekton de multfacetaj kaj impresaj japanaj poemoj. Ili kondukis min al diversaj animstatoj, al melankolio, al amĝojo kaj amdoloro, al studenta festo kaj al infanludoj. Kaj admirante mi konstatis, ke la lingvaĵo tute korekte, eĉ majstre estas formita, kaj laŭenhave, kaj laŭritme, kaj laŭrime. Tio signifas, ke en la vicoj de la japanaj amikoj troviĝaj kelkaj elstaraj tradukantoj. Mi nepre menciu la nomojn Miyamoto masao, Konisi gaku, Matuba kikunobu, Osaka kenzi. Ili majstre prezentas

al ni impresojn pri japana versarto kaj japana vivsento, en kiu ankaŭ ne mankas junula freŝeco, kiel ekzemple en la jena teksto, tradukita far Osaka kenzi:

Al la vivo venos fin',
amon do ĝuu knabin'!
Dum ankoraŭ floras san'
sur la ruĝa buŝ',
dum varmega en ni sang'
kuras per dispuŝ'!
Kia morgaŭ la destin'
ja atendas nin?

La kompilinto de la libro pruvas sian zorgemon ankaŭ per tio, ke li por kelkaj el la 20 Eŭropaj kantoj ne prenis ekzistantajn Esperanto-versiojn de la teksto, sed nove kaj pli bone tradukitajn. Ni prenu la ekzemplon de la germana lulkanto, novtradukita far K.H.Sisido:

Bonan nokton, infan',
trankvile en lan',
kovrita per roz',
por bela ripoz',:
ĝis maten', kiam di'
ĝis maten', kiam di'
sendos lumon al vi.

Post la ĝuo de la tekstoj mi elprovis la muzikon uzante pianon, kaj mi nepre devas laŭdi la tute korektan kongruon de la tekstoj kun la muziko. (Tia kongruo ofte mankas en kantlibroj).

Tamen necesas malgranda kritiko: kial la eldoninto ne aldonis la indikojn pri la akompane uzendaj harmonioj? Tio ege helpus al ludanto de gitaro por akompani la kantantojn.

Sed ankaŭ en la nun ekzistanta formo, la libro tre utilas por la Esperant-movado. La Eŭropaj esperantistoj elmontru sian internaciecon per kantado de tiuj kantoj karmemoraj". Pro la melodioj iomete nekutimaj por eŭropano estus pli bone, se ĉiu kantanto povus rigardi ankaŭ la notojn dum la kantado, kaj per tiu metodo li povus relative rapide ekposedi ankaŭ tiun valoran parton de la Esperanta kaj monda kulturo.

Michael Behr
(GDR)

Bele kaj klere pri sekso

Dr. Szilágyi Vilmos: Szerelmi kultúránk. Képeskönyv a szexről. — Kulturo de la amo. Bildlibro pri la seksa vivo. Esperantigis: Aladár Tót. Ilustris: Rita Lovag kaj András Huszár. Kun 77 tutpaĝaj ilustraĵoj. Paralelaj hungara kaj Esperanta tekstoj. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1988. 14x21 cm, 192 p. Prezo: 21,- gld.

En 1972 Eldonejo TK aperigis „ABZ de amo", danan enciklopedion de amoro, originale elirintan jam en 1961. Al okcidenta leganto, kiu en sia nacia lingvo povis elekti el inter plej diversaj amorgvidiloj, ĝi jam ĉe

sia apero impresis eksmode. Ĝi reprezentis la fruan specon de sia ĝenro, kiu ĉiupaĝe gurdis por sia pravigo, kiel bela afero estas sekso. Por okcidentano de 1972 tio sonis iom ŝime, precipe por junularo, jam transvivinta la apogeon de la seksa revolucio.

Esperantistoj eĉ spertis „ABZ de amo" kiel sensacion, ĉar ja en ilia medio ĝi estis pionira. Kelkaj kriis pri skandalo: la revuo „Esperanto" rikoltis protestojn pro reklamoj de tiu malpermesita frukto. Sed... pasis jam 16 jaroj kaj ankoraŭ ne elĉerpiĝis la libro. Tio pruvas ion ĝenerale validan pri fakaj verkoj en Esperanto: eĉ se kiel ajn senprecedenta en Esperanto, neniu verko prosperas, se ĝi ne atingas la nivelon, kiun esperantistoj jam disponas en sia propra lingvo.

Nu, en 1987 UEA portis por la kongresa libroservo de la varsovia UK centon da „ABZ de amo". Jam unutage la tuta stoko estis vore foraĉetita, ĉar por orienteŭropanoj temis pri verko, kian ili apenaŭ trovis en siaj librovendejoj. Ili estus povintaj eĉ komplete malaperigi ĝin de la merkato — ĝustatempe antaŭ la apero ĉe HEA de malpli kosta rivalo, „Kulturo de la amo" de d-ro Vilmos Szilágyi.

Mi ne plene komprenis el la antaŭparolo, ĉu „Kulturo de la amo" estas la unua amorinstrua bildlibro en Hungario, sed certe ĝi estas inter la unuaj. Tial estas interese kompari ĝin ĝuste kun „ABZ de amo". Necesas tamen noti, ke la dana verko estas multe pli ampleksa ol la hungara, ĉar enciklopedio de ĉio ebla ekde masturbado ĝis kontraŭ-koncipaj metodoj, dum „Kulturo de la amo" temas ekskluzive pri la amora akto kaj ties diversaj eblaj scenoj.

La hungara verko nete venkas la danan, kiu nun definitive arkaikiĝis eĉ en Esperantujo. D-ro Szilágyi ne tedas nin per tro da konvinkadoj pri natur○eco kaj homeco de sekso. Anstataŭe li devas antaŭparole pravigi, ke sekve ankaŭ eldoni literaturon pri ĝi estas nature kaj necese. Tio kompreneblas en verko, kiu pioniras en sia lando. Se temas pri la stilo de prezentado, tiu de „ABZ de amo" estas miksaĵo de afekta familiareco kaj kuracista lecionado. D-ro Szilágyi havas stilon trankvilan, varman: li ne afektas naturecon — li estas natura.

La prezentado mem estas interesa. D-ro Szilágyi ne babilas, sed li kvazaŭ nur komentas, mallonge, ĉiujn 77 figurojn, kiuj estas la esenco de la libro. Jen kion li volas instrui: „La amorado valoras tiam, se ĝi ne estas ŝabloneca, sed fantaziriĉa, krea ludo!" Kun la legantoj li studas la bildojn kaj per siaj komentoj celas elvoki ilian fantazion. Kiel moderna edukisto li scias, ke por tio sufiĉas nur kelkaj sugestoj.

La ilustraĵoj de la jena verko estas tre altkvalitaj, io tute alia ol la krude sengustaj amatoraĵoj danaj. Ne nur la kovrila, sed multaj aliaj estas de tiel bela erotiko, ke oni facile imagas la belecon de la kolora libro, en kiu ili estis sen teksto eldonitaj jam pli frue.

Unikeco de la libro estas ĝia dulingveco. La hungara estas kvazaŭ la ĉefa, ĉar la kovrilo havas tekston nur en ĝi. Sed ĉio cetera estas ankaŭ en Esperanto. Tio ebligis eldonkvanton de 246 000 ekz., astronomia cifero por Esperanto-libro. (Intertempe aperis represo en 40 mil ekz. — La REd.) Centmiloj da hungaroj ricevas per ĝi ne nur novajn impulsojn por sia intima vivo — espereble estas inter ili ankaŭ tiaj, kiuj iam poste prezentos tre nekutiman respondon al la demando, kiel ili venis al la ideo lerni Esperanton. Kaj ankaŭ la ceteraj el tiuj centmiloj ne restas dubi, ke Esperanto estas lingvo natura kaj vivanta.

La dulingvecon mi salutas ankaŭ pro alia kialo. Mi vidas en ĝi eblon, de kiu povus multe profiti la faka Esperanto-literaturo. Prof. Helmar Frank jam pli frue pledis por ĝi; lia lernolibro de kibernetika pedagogio aperis en germana-Esperanta kaj ĉina-Esperanta eldonoj. La Esperanta publiko ne sufiĉas kiel merkato por sciencaj-teknikaj verkoj, dum la dulingveco plivastigus la klientaron.

La apero de „Kulturo de la amo" denove pruvas, ke laŭ kvanto, kvalito kaj skalo HEA atingis solidan lokon inter la eldonejoj en la Esperanto-mondo.

Osmo Buller
(Finnlando)

BVM®



Kurt-stega haloskeleto, kun diversalta trabo.

VAROGRUPOJ KAJ DOMSTRUKTURAĴOJ FABRIKITAJ DE BVM

Ter- kaj pluretaĝaj domoj kaj halostrukturoj, ankaŭ la kompletigantaj murpaneloj — termizolaj aŭ ne —, ripaj elementoj de tegmentoj kaj plafonaĵoj, ĉelaraj plafonpaneloj.



7. **Pluretaĝa ŝalbeton-skeleto, kun kašita ŝtalkonzolo.**



Varianto UNIVÁZ-C aksonometrie.

FUNDAMENTO-ELEMENTOJ: FOSTOJ, BAZAĴOJ.



HIDROTEKNIKAJ ELEMENTOJ: GRAVITAJ TUBOJ, STREĈITAJ PREMKONDUKILOJ, VTS-BVM OBJEKTOJ, K.T.P.

TOG-betontuboj 2mm-aj: „V" akvoizola kaj „Ia" ne akvoizola kvalitoj. Maltaŭgaj por kaŭĉukringa interligo.



Kvarangulaj objektoj



Poligonaj objektoj



TRAFIKRILATAJ KONSTRUEROJ: PONTOTRABOJ, ŜOSEEROJ, TRAMTRAK-KONSTRUA SISTEMO, PRESTRECITA BETONŜPALO, POR-TUNELAJ TUBINGEROJ, KTP.



Metrotunela ringo en Budapeŝto, Prago kaj Kalikato.

Tubingringo de la fervojtunelo Vračar ĉe Beogrado.

Tubingringo en stacio de la Praga metroo.



Sekcoj de EHGT-traboj

SUBSTRATAJ KONSTRUAĴ-ELEMEN-TOJ: TUNELEROJ POR DUKTOJ KAJ KA-NALOJ, ALTTENSIAJ KONDUKILO-PILONOJ, KTP.



APARTAJ FABRIKAĴOJ. MIKSITA BETONO.



GAJA PAĜO



NEDERLANDAJ MUELILOJ

Kun plezuro fremdulo rigardas la pitoreskan ventmuelilon apud kanalo, kaj li alparolas la zorganton:

– Antaŭ kelkaj jaroj, kara sinjoro, mi vidis tie ĉi du ventmuelilojn. Ĉu oni malkonstruis iun?

– Kompreneble, sinjoro. Estis nepre necese, ĉar la vento ne estis sufiĉa por ambaŭ.

KIAL TIMI?

La fungojn kolektantan avineton haltigas la arbaristo.

– Ĉu vi ne timas, avinjo – li demandas – ke inter la fungoj troviĝas ankaŭ venenaj?

– Kial mi timu? Morgaŭ mi vendos ĉiujn en la foiro.

DELIKATA ALUDO?

– Onidire, kunloĝante oni povas vere ekkoni unu la alian. Ĉu ne, sinjorino?

– Tute prave.

– Mi forte dezirus vin bone ekkoni. Do, kiam mi ekloĝu ĉe vi?

NIGRA ŜERCO

– Polvo oni fariĝas post la morto! Certe vi scias tion, karulinjo? – demandas sinjoro verdavalo.

– Memkompreneble, karulo – jesas la edzino.

– Nu, tiam rigardu en la ŝrankon! Almenaŭ tri kadavroj en ĝi...

SAME NIGRA (AŬ PLI?)

– Nur kelkaj tagoj pasis, kara Rozinjo, post nia geedziĝo, kaj li jam estas mortinta – ploras la amikino.

– Do ne ploru multe pro tio, kara Anjo. Almenaŭ li ne longe suferis.

HO, KOMPUTILOJ!

Post la interparolo la personarĉefo gratas sian nukon, kaj deklaras – kvankam malklaras:

– Mi ankoraŭ ne povas promesi, ke vi ricevos la postenon. Sed havu esperon, ĉar al la komputilo vi alte plaĉis!

ĈIAM KOMPUTILON?

– Vespere, kara kolegino – diras la ĉefo al la sekretariino – ni kune foriros, kaj mi montros tion al vi, kion neniu komputilo scias.

JARCENTO DE LA TEKNIKO (fig. 1.)

– Dum kion da tempo estos riparita mia tele

– Post semajno vi rericevos ĝin, sinjoro!

– Kaj se mi pagos al vi, eblos nur post unu mo

JARCENTO DE LA TEKNIKO (fig. 2.)

– Mi trovas viajn mastrumajn aparatojn eksterordinare malkaraj. Tre brave! Tamen, diru al mi, ĉu vi entute profitas el ili?

– Nu, fakte neniom. Nur el la riparadoj.

... (fig. 3.)

– Paĉjo, permesu al mi hodiaŭ uzi vian aŭton!

– Hm, diru jam fileto: por kio servas viaj gamboj?

– Nu, por premi la kluĉ-pedalon per unu, kaj por pedale akceli per la alia.

KOKRITA EDZO

– Mi venis hejmen abrupte – krias la edzo – kaj jen, skandalo! En nia lito tiu junulo! Vi, vi...!

– Ĉesu mia kara! Kial vi kriaĉas, kvazaŭ vi estus la sola kokrita edzo en la mondo!

ŜI PRAVIS!

(Ni ripetu ekde la komenco) Do:

– Mi venis hejmen abrupte – li krias – kaj jen, skandalo! En nia lito mi trovas vin denove! Se nur unufoje mi revidos vin tie kun mia edzino – do... tiam vi rajtos ŝin forporti!

ĈU SUSPEKTI?

– Mia edzo estas terure ĵaluza, amikinjo. Li severe observas la virojn ĉirkaŭ mi.

– Faru kiel mi, kara. Kiam mia edzo eksuspektas mian amaton, tiam jam delonge mi kokras lin kun alia.

Tankao

Ni citas la poemon (tankaon) de Edwin de Kock: „Ŝi atentigis..." — la daŭrigon vi trovos en linioj H. 1., H.38. kaj V.1. (ensendendaj linioj). Inter la solvintoj ni lotumos premiojn. Limdato: du monatoj post la alveno de la revuo.

HORIZONTALE: 13. Aldoniĝi, membriĝi, 14. Muzika formo en opero, 15. Ŝirmita kontraŭ infekta malsano(R), 16. Tre malofta, 17. Peni ne renkonti(R), 18. Virnom', 19. Membro de klubo, 20. Patron de patro, 21. Teksaĵo uzata por purigi(R), 22. Litero M!, 23. Reen: ekstrema flanko, 24. Praa armil', 26. Identaj vokaloj, 27. Mallongigo de Sovetia inform-agentejo, 28. Konsciaj pri siaj meritoj, 30. Samspecaj de nomo! 31. Somera monat', 33. Artikolo, 34. Monto de la Muzoj, 40. Moderna substanc', 42. Konjunkcio, 43. Brilblanka globet', 44. Kemia simbolo de antimono, 46. Ekvatora konstelacio, 48. Fino en šakludo(R), 49. Centrifuga infloresko ĉe floroj(R), 51. ...-no: griza metaloido, veneno, 52. Reen: propra, 53. KR, 54. Epopeo de Homero, 56. Metala najlego(R), 58. Literoj AB! 59. Komuna manĝo de prakristanoj, 60. Komercaĵo, 61. Metalon mordi per ilo(R), 62. Havanta guston de maro, 63. Biblia patriarko, ebriigita de siaj filinoj, 64. Rivero enfluanta Rejnon.

VERTIKALE: 2. antaŭensvingo de korpo ĉe starto, 3. Delokigo al si, 4. Ne juna, 5. Persona pronomo, 6. Parto de preĝejo, 7. Konsumi alkoholaĵon, 8. Reen: tabelvorto, 9. AO, 10. Kredo, 11. Reen: la plej eta materiero, 12. Somermonatan, 17. Parulino de Adamo, 18. Alta vegetaĵaro, 20. Utila arb' de malvarmaj zonoj, 21. Lumturo, 23. Narkotaĵ', 25. Langa tuŝado, 27. Vizaĝkoloro — reen, 28. Troviĝos en ia sanstato, 29. Prepozicio, 32. Estas en turo! 33. La Reĝa Mošto, 35. Reen: nia junulara organizo, 37. Ceremonia marŝo, 39. Sufikso por partoj, 41. Kompara konjunkcio — reen, 43. Lavil' — reen, 45. Balkana gent', 47. Kor' ne faru tion maltrankvile! 48. Legendo(R), 50. Poseda plus persona pronomoj! 52. Ekstrema flanko, 53. Inventinto de benzinmotoro (kun komenco de l' antaŭnomo), 55. Indiana trib', 57. Valormetalon, 58. Ano de Hindia pragento, 60. Sankta promes', 61. Tre konata(R), 63. Prepozicio (duakvadratedu literoj), 64. Molaj konsonantoj!

I. Z.



Solvo de la krucenigmo en la n-ro 1988/2:

Hundbazaro — La fermita urbo — Johano la Brava — Ĉiela birdo — Hungaraj fabeloj. (Eldonaĵoj de HEA)

Premion gajnis per lotumado:

Vasil I. Georgiev, Šumen, BG; Svetlana Pogorelaja, Kiev, SU; Uwe Werner, Zeitz, GDR. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

EKZAMENO SEN RISKO

Ekzamenanto: Márton Fejes

Mistera lumo
de Julian Modest

En tiu ĉi libro de la dramisto kaj romanisto Julian Modest estas kolektitaj liaj dise aperintaj noveloj.

1. Kio estas la profesio de Dobrin Karov?
2. Kio estas la titolo de novelo, kiun redaktoro Kalov laŭdis, riproĉis — kaj rifuzis?
3. El kiu epoko devenis la argila kamelo?

Limdato: du monatoj post la alveno de la revuo.

Solvoj de la demandoj en la n-ro 1988/2:

1 Senlace piedmarŝi — ignori la modon — toleri la mankon de mono.
2. Pri alergio.
3 Kolonelo.

(„Adiaŭ Kuzko!" de Oldrich Knichal)

Premion gajnis per lotumado: S-ino Suna Oliveyra, Amsterdam, NL; Takács István, Marcali, H

La verkoj de la sekvaj ekzamenoj: 1988/6: „D-ro Braun vivas en ni — Kripto" de Julian Modest. 1989/1: „Dum vi estis kun ni" de István Nemere. 1989/2: „Perfekta civitano" de Sándor Szathmári. 1989/3: Vivi estas danceere de István Nemere.

Korespondi deziras

Anoj de kolektanta klubo ktm. Kolektantoj skribu al prez. Vladimir Kornujenko, ul. Narodnaja 11/76, Minsk SU-220107. — Inĝ. Leon Chodera (47) pri problemoj de Eo, kol. pm, bk, E-librojn, gazetojn. Warszawa ul. Krasnobrodzka 17m190, PL-03-214. — Bozena Golonka (25) poŝtoficistino, pri literaturo, brodado, kol. pm, bk. Kraków ul. L. Wenedy 11/27, PL-30-833. — Slawomir Dudzik (26) flegisto, pri filozofio, religioj, medicino, Eo. Piastów str. Godebskiego 5, PL-05-820. — Piret Trumaa (19) veterinar-studentino, pri junularaj aferoj, turismo. Tallinn, Maardu, Vöerdla k. Estonio SU-200.901. — Vilija Viziene (36) ekonomikistino, ktm, pĉt. Vilnius Viršuliškiu 67-53. Litovio SU-232.056. — Adam Seroczynski (30) fraŭlo, precipe kun Hungario, Japanio, Hispanio, pri turismo, antikva historio, popolkutimoj, kol. urbaj bk. Legnica str. Hutników 11/5, PL-59-220. — Roman Gawron (17) int. pri alilandaj vivo kaj mod. muziko. Radomsko Plac 3. Maja 10/13, PL-97-500. — Jerzy Kucharski (29) fraŭlo, el. teknikisto, pri muziko, fotado, grafiko, naturo. Sochaczew ul. Zwirki-Wigury 16/21. PL-96-500. — J. Haering (28) tekn. oficisto kol. bk, int. literaturo, nuna vivo. Stéchovice Hlavni ul. 64. CS-252-07. — F-ino Lucyna Chodera (30) pĉt, kol. pm, bk. Zlotów Obr. Warszawy 32, PL-77-400. — Kristoforo Zastawny (18) pri sporto, jun. muziko, aviado. Pruszcz Gd. Obr. Wybrzeza 12/21. PL-83-000. — Zbigniew Geppert (32) fraŭlo, rentisto, kun virinoj el F, H, I. Nova Sól ul. Zielnagórska 25/2, PL-67-100. — Nikitin Vl. Petroviĉ (43) min-inĝeniero, pri jogo, psikohigieno, korpkulturo. Solneĉnij str. Stroitelej 13/1, kv. 4. Jakutio, SU-678.626. — Siiri Rebane (18) farmaci-lernantino, pri gvidado de jun. kluboj, E-aranĝoj, kol. bk. Tallinn Nömme tee 49/313. Estonio SU-200.013. — Instruistino Antonina Zavišа (40) solulo, pri div. tem. kun BG, H, NL. Leĉno 85, PL-97-333. — Ges-anoj (20-70) ktm interkonatiĝi el la E-rondo: Polski Zw. Esperanto, Tarnów skr. p. 79, PL-33-100. — Ivan Kalojanov (29) pri prahistorio, fantasto. Varna str. V. Kolarov 93/B, BG-9002. — Catherine Kasemaa (17) ktm, pĉt, Haapsalu Nöukogude 8-2/1. Estonio SU-203.170. — F-ino Alina Chruŝcinka (28) inĝenierino, pri homoj, lingvoj, scienco, ŝatas brodi, stebi, legi. Zamośĉ Al. Lenina 40/37 PL-22-400. — Kristoforo Zero (30) laboristo, pri turismo, literaturo, folkloro, kol. bk. Lipno str. Laczna 31, PL-87-600. — Marta Jasinska (23) studas matematikon, int. filmo, turismo, kol. tur. mapoj, prosp., bk. kovertoj. Chrzanów Kadlubek 24a/10. PL-32-500. — S-ino Verena Góday (29) pri muziko, ludas orgenon, kol. bk. Leipzig str. 18-Oktober 6A/64, DDR-7010. — Gregor Wienc (30) laboristo, kun naturistoj/nudistoj. Owinska ul. Poprzeczna 14c/13. PL-62-005. — Aldona Skwiercz (29) ekonomikistino, edzino, pri div. t. Puck ul. Armii W. P. 29/7. PL-84-100. — Karel Hájek pri div. t. kol. bk. pm., komencanto, Ceské Budéjovice, Knézkodvorská 13. CS-370.01. — Zoja Sledzinskaja (18) pri muziko, ktm. Moskva ul. Novozavodskaja d.8/8-6, kv. 26. SU-121.078. — F-ino Teresa Wrodycka (33) juristino, pri literaturo, homoj, lingvoj, herbario k.a. ktm. Radom ul. Wodna 18ml. PL-26-600. — E-Klubo Radieto, ktm, pĉt,/plejparte junuloj/. Tallinn Estonio SU-203.170 p.k. 71. — S-ino Bogda Szytkowska agronomo (30) komencanto, kun hungaroj. Kolin Rzeplino 54, PL-73-116. — Ĉajkin Vadim (15) komencanto pri Eo,-literaturo k.a., muziko, kol. E, bk, pm. Curupinsk-1, pk. 24, SU-326.520. — Inĝ. Oleg Streleckij (27), ktm, interŝ, pm. bk, E-aĵ-oj, pri komputado k.a. Minsk, str. Mjasnikova 78/5. SU-220.050. — F-ino Halina Radola (27) bibliotekistino, pĉt. Domachowo Stara Krobia 91, PL-63-804. — E-familio, Gena Jemeljanov (28) kaj Zjuda (24) pri denaska edukado k.a. Rostov-na-Donu Parusnyj 36. SU-344.034. — S-ino Clementine De Cuyper (62) kun amikoj. Windmolenstr. 56, Hoboken B-2710. — Molnár József (32) oficisto, interŝ. librojn (precipe anglalingvajn) kaj filatelia̯ojn. Győr Radnóti M.u. 38. H-9025.

LETERKESTO

Bernd Mann, Leipzig, GDR: Kiam vi multe, kaj ĝis nun vane penis publikigi en revuo la germanlingvan tradukon de „Laura" (el Eo), tiam vi devis ekkoni la ĉie ajn ekzistantajn baraktadojn de verkistoj. Trovi publikeblon por sia verkita aŭ tradukita literaturaĵo estas tutmonde ege malfacile, kaj precipe tiel estas por novuloj en tiu branĉo... Malgraŭ tio, la penoj iom post iom renkontas sukceson, se oni eltenas.

Veres József, Etyek, H kaj aliaj: viaj rimarkoj kaj komentoj koncerne la du tradukojn de TOLDI (en n-ro 1988/2.) estus longe citeblaj. Ĉirkaŭ tiuj, memkompreneble, ekiĝus vasta diskuto, kiu devus tuŝi multajn flankojn de la poezia traduk-teorio, same plurajn punktojn de la E-aj metriko, rimado kaj similaj. La diskuteblon aparte hejtas la eksterordinara malfacileco de tiu ĉi traduka tasko: respeguli kiel eble plej konvene, eĉ konforme la diamantajn versojn hungarajn. Ni devas tamen konsideri la hungare ne komprenantan legantaron de H.V. (granda plimulto!), kiu ne povas profundiĝi en labirinton de la hungara poetiko. Rezignante kun bedaŭro pri publika diskuto (almenaŭ en revuo) la diskutantoj espereble interkontaktos — kune kun la tradukintoj — por solvi problemojn, trovi esprimojn pli taŭgajn, igi klaraj la teorie dubajn rimedojn — entute: plialtigi la poeziajn tradukmanierojn, la artan esprimadon, surbaze de tiu klasika verko.

M. Z. kaj aliaj: „Afableco peto ol elsendi sur adreso doni pli malatte..." — jen frazo vere tikla kaj enigma. Domaĝe, foje venas tiaj leteroj, el kiuj eblas diveni emon anonci ies deziron korespondi... Tamen se la eventualaj partneroj staros antaŭ tiaj enigmoj, korespondado apenaŭ havas sencon. Oni devas almenaŭ elementajn konojn lerni (kelkaj monatoj sufiĉas tiucele!), utiligi vortaron, kaj tiam facile foriĝos frazoj kiel la supre citita! Ni petas indulgon al la bonvolaj respondontoj, kiuj devas ne teruriĝi, antaŭ malesperantaj frazoj malesperiĝi... luj legantoj ĝentile petas la redakcion „trovi por ili korespondanton" — kion H.V. certe ne povas surpreni malgraŭ niaj plej bonaj intencoj. Oni sendu tiucele taŭge redaktitan/konceptitan anoncon, indikante siajn dezirojn kaj iom pri si mem — tio kutime trafos la celon!

E HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO * Ĉefredaktoro: Vilmos Benczik * Redakta Komitato: Szilárd Bálint, Stefan McGill, Tibor Bessenyei, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, d-ro György Nanovfszky, Péter András Rados, Sándor Révész, Zsuzsa Varga-Haszonits. * Ĉefkunlaborantoj: Mihály Gergely, Alfons Pechan, Aurél Ponori-Thewrewk * H-1368 Budapest, pk. 193. Telefono: 563-659, 564-093. Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. * Respondeca eldonanto: Oszkár Princz. * Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (HELIR, Budapest XIII. Lehel u. 10/a. H-1900) senpere aŭ per poŝtmandato. * Abonprezo por jaro (ses numeroj) 11,- USD aŭ egalvalora sumo en alia valuto. *
Indexszám: 25 377 0018-7704, ISSN 0018-7704.

Készült a MÉMMI sokszorosító üzemében, Gödöllő – 215/88

1989 FEB 2

HUNGARA kablo-fabrikaro SZEGED

Multe pli agrablaj vi trovos
la varojn el naturaj materialoj!

Estas inde aĉeti niajn produktaĵojn el mato, kariko kaj pajlo – ankaŭ niajn plaĉajn feraĵojn sintritajn, fabrikitajn de kooperantaj hejmlaboristoj en

HÁZIIPARI SZÖVETKEZET
Tápé, Régész tér 8.
H-6753

1989 FEB 2